

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 554 (1) JAN. 1952



En Paradizo : vitraĵo desegnita de Prof. Jaroslav Brychta
(vidu paĝon 22)

Specialaj artikoloj :						paĝo
Nova jaro—nova faro :	<i>La Prezidanto</i>	..	..	..	..	1
Ĉe sojlo de nova jaro :	<i>La Redaktoro</i>	..	..	..	..	2
Centro de Esploroj kaj Dokumentado (CED) de U.E.A. :	<i>D-ro I. Lapenna</i>	..	..	..	..	5
Studentoj kaj Esperanto	..	..	..	..	..	7
Norvega Popolmuzeo en Oslo, La :	<i>Boye Skeie</i>	..	..	..	..	9
Bruligaj Bombadoj :	<i>D-ro P. Kempeneers</i>	..	..	..	..	12
Antikva pacifisto—la Hinda imperiestro Aŝoka :	<i>Prof. E. Privat</i>	..	..	..	..	13
Reĝaj Komisionoj :	<i>Mason Stuttard</i>	..	..	..	..	20
La Vitroarto en Ĉeĥoslovakujo :	<i>Jovo</i>	..	..	..	..	22
Notoj pri hispana ekonomio :	<i>E. Guillem</i>	..	..	..	..	23
Novelo : La Perdita Velo :						<i>F. Szilágyi</i> 25
Poezio Originala (Belartaj Konkursoj 1951)						 4
la 37-a Universala Kongreso de Esperanto						 8
Konstantaj Rubrikoj :						
El la Oficejo	..	..	..	..	..	14
Enigma Konkurso N-ro 64	..	..	..	..	..	24
Esperantista Vivo	..	..	..	..	..	29
Internacia Konkurso 1951	..	..	..	..	..	29
Niaj Kunlaborantoj :	Otto Walder, Svislando	..	..	..	..	14
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	31
Por via Distro	..	..	..	..	..	15
Radio kaj Esperanto	..	..	..	..	..	30
Tra la Libraro	..	..	..	..	..	16
Tra la Mondo Esperantista	..	..	..	..	..	3

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 554 (1)

Januaro 1952



La Prezidanto de U.E.A. :

Nova jaro — nova faro

JE la jarŝanĝo niaj pensoj vagadas en la labirinto de la memoroj, kiujn ni kolektis en la pasinta jaro; sed ni ankaŭ plektas florbukedon de karaj esperoj pri la nova jaro.

Por nia internacia movado la paco en la mondo valoras pli ol io alia. Ĉar kiam regas paco, nia movado konstante kreskas, sed sub la milita monstro ĝi velkas. Libereco kaj paco estas la konvena klimato por Esperanto.

U.E.A. renkontas la novan jaron per bonaj esperoj kaj kuraĝaj preparoj por la evoluo de nia afero. La plej grava nova entrepreno estas la starigo de "Centro de Esploroj kaj Dokumentado" (C.E.D.) sub honorofica gvido de prof. Ivo Lapenna.

La nomo de tiu Centro indikas ĝiajn labortaskojn. Unu el la aktualaj aferoj pristudotaj estas ekzemple la detala dokumentado de nia petskribo, nun transdonita de UNO al UNESKO. La deziresprimo de la petskribo, en la nomo de 16 milionoj da homoj, devas esti kompletigata per ĉiuspecaj faktoj rilate al Esperanto. Por tiu celo CED kolektos informojn pri la stato de la nuna Esperanto-movado: nombro de venditaj lernolibroj kaj vortaroj, Esperanto en lernejoj, Esperanta literaturo kaj gazetaro,

internacia faka kunlaborado inter geinstruistoj, sciencistoj, ĵurnalistoj k.t.p., praktika aplikado de Esperanto en radio, komerco, turismo k.c., kulturaj manifestacioj en kaj per Esperanto, opinioj de gravaj personoj kaj institucioj pri Esperanto, la rolo de Esperanto por la firmigo de tuthomara solidareco kaj interfratiĝo.

Cetere CED devos atente pristudi ĉiujn aktualajn problemojn en la kampo de internacia lingvo por prezenti al la Esperantistoj taŭgajn armilojn kaj municion. Ĝuste nun leviĝas la neceso kolekti argumentojn kontraŭ bilingvismo, basic english, baza franca lingvo kaj la lingvo-ideo de Stalin.

La kreo de CED celas forigi gravan mankon en la servaro de U.E.A. Kondiĉo estas kompreneble, ke la asocioj kaj esperantistoj kunhelpas per akurata kaj rapida respondo je informpetoj de CED.

U.E.A. estas iom fiera pro la starigo de tiu nova oficejo. Tamen mi volas akcenti ke sen la mondonacoj de bonvolaj esperantistoj ne estus eble funkciigi ĝin. Mi prezentas mian dankon al la donacintoj kaj invitas aliajn samideanojn kontribui por ebligi pliampleksigon de la servaro de U.E.A.

E. Malmgren.

La Redaktoro :

[^] Ce sojlo de nova jaro

[^]C E jarfino la homoj fordeziras la malnovan, la finiĝantan jaron kaj ĝoje aklamas la novan. Sankta iluzio, kiu faciligas la vivon, sen iluzioj oni vere ne povus ekzisti. Ni ĉiuj salutas la alvenon de la **Nova Jaro** kun la infan-naiva sento, ke realiĝos ia deziro, ke pliboniĝos situacio, ĝenerale ke ni estos pli feliĉaj, ol dum la pasinta jaro. Same ni aklamis la finiĝantan jaron kaj ripetigis la sama ludo venontjare. Ni ekzamenas la pasinton kaj serĉas rimedojn por esti pli bone ekipataj en la estonteco. Ni ĝojas pri la atingitaj sukcesoj kaj ni plendas pri eblaj mankoj.

“*Estis bona jaro*”, iuj diras ; aliaj faras acidan grimacon “*malbenita jaro*” ! Kion ni diru, ni Esperantistoj, pri 1951 kaj kion ni atendu de 1952 ? Trankvila, objektiva konsidero de la reala situacio en la mondo rajtigas nin diri, ke la jaro pasinta estis bona. Jam la simpla fakto, ke ni ekzistas spite ĉiajn komplikajojn de konfuza mondo estas bona signo. Sed ni ne nur **ekzistas**, ni **progresas**. Niaj organizaĵo kaj manifestacioj internaciaj montras okulvideble, ke Esperanto vivas kaj funkcias. Ekstera signo estis la 36-a kongreso en Munkeno, brila okazaĵo.

La problemo de la internacia lingvo ne plu malaperas en internaciaj diskutoj. La kreo de internacia armeo en Eŭropo ree levas la demandon pri rekta interkompreniĝo. Diversaj rimedoj estas proponataj, pri kiuj ni, anoj de la sole funkcia internacia lingvo ridetas. Oni proponas **dulingvecon** anglo-francan, oni rekomendas limiĝi al nur la angla lingvo, kaj la lasta propono estas la franca lingvo sub formo de (fiaskinta) baza angla, do baza franca lingvo. Tre bone: ni jam povas antaŭdiri la rezulton. Ĉio tio servas nur por nia dokumentado, estos plia pruvo per eksperimenta, ke reformita lingvo nacia ne estas la solvo. Post la *Weltddeutsch*, la *Basic English*, nun venos eble la *français de base*. Ni atendas senpacience la orientan proponon, ian kombinaĵon de slava lingvo destinata por uzado internacia. Tiu ĉi idea konfuzo ja multe similas je la sama fenomeno en ĉiuj gravaj problemoj tutmondaj. Unu plian fojon pravas Doktoro Zamenhof elektinte alian vojon, kiun ni sekvas :

*ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
ĝi estas, la voĵ' elektita !*

Hans Jakob.

Baldaŭ aperos la felietonoj de F. Omelka

LA ALASKA STAFETO kaj KAPTITAJ DE LA GLACIROKOJ

en unu volumo

ELDONOS THE ESPERANTO PUBLISHING Co. Ltd.

Detaloj en baldaŭa numero



Tra la Mondo Esperantista



Britujo

Prelego ĉe grava kunveno. En Novembro S-ro C. W. Frerk faris prelegon pri Esperanto ĉe la Lingvista Klubo en Londono. Ĉeestis proksimume cent personoj—lingve tre miksita aŭdantaro. Sekvis la prelego vigla diskuto kaj multaj demandoj, kaj la sukceso estis eksterordinare bona.

Italujo

Nacia kongreso. La venontjara nacia kongreso de la Italaj samideanoj okazos en Bologna, 6–9 Septembro 1952. Oni intencas organizi en palaco en la centro de la urbo ekspozicion de Esperantaĵoj, kaj petas la alsendon de ĉio kio povos esti utila, eĉ se nur salutkartoj. Adreso: Esperantista Grupo “A. Tellini”, Via Borgonuovo 16, Bologna.

Nederlando

Philips-fabriko. La Esperanto-Klubo tie estas daŭre aktiva sed petas helpon de laborantoj de tiu firmao en aliaj landoj. En septembro 1951 Philips Presa Servo fondis korespondan klubon por Esperanto. Ĝi anoncis la fakton . . . kaj ricevis 3 respondojn—jes, nur 3!

Bonvolu helpi! Personoj, kiuj laboras ie en la mondo ĉe Philips povis legi pri la Koresponda Klubo en la gazeto de la Philips fabrikoj. Ili skribu al Philips Koresponda Klubo, Eindhoven, Nederlando, sed NEPRE NE menciu ĉi tiun atentigon.

Norvegujo

Rezulte de la kursoj, kiujn gvidis dum printempo 1951 la eksterlandaj instruistoj dungitaj de Norvega Esperantista Ligo, kaj ankaŭ rezulte de la koresponda kurso de N.E.L., fondiĝis novaj grupoj en kvin lokoj.

Pro tiuj sukcesoj N.E.L. dungis por la nuna sezono tri eksterlandajn Cseh-metodajn geinstruistojn: S-inon Haudebine el Parizo, S-inon Major el Londono, kaj D-ron Mildwurf el Londono. Krome la Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro Stuttard, gvidas kursojn en Oslo, kaj kompreneble okazas kursoj gvidataj de lokaj samideanoj en multaj urboj. En Bergen kaj en Trondheim la nombro de kursanoj superas 100.

N.E.L. tradukis la usonan propagandbroŝuron “Esperanto, la internacia lingvo”, kaj presigis 17,000 ekzemplerojn. Plie oni ellaboris kurson por aperigo en gazetoj.

La gazetara servo ĉiun duan semajnon dissendas Esperantonov-aĵojn al ĉiuj norvegaj gazetoj, kaj la gazetaro en kreskanta grado aperigas ilin.

La preparoj por la 37a U.K. en Oslo bone progresas. La 27an de Novembro Klubo Esperantista en Oslo celebris sian 35-jaran jubileon per bela festeno.

Belartaj Konkursoj 1951: Poezio Originala

Nokta paŝo kaj **Nokto en Ĝardeno** kune ricevis la 1-an premion ;
En Mia Mio kaj **Anna** (ne represita ĉi tie) la 3-an.

Nokta paŝo

*Noktmezo. Mi vekigas en malhelo.
 Kovras la aĵojn mistero vuala.
 De la horloĝo ĉe l'ritmo egala,
 Vagadas mia pens' tute sen celo.*

*Subite, en la nokto, el la strato,
 En mia kor' eĥo de paŝo ĝemas :
 Rapida paŝo, kiu ŝajne tremas,
 Kiel de hom' kun interna korbato.*

*Vi, kiu, sola, tra senhoma vojo
 Marŝas, spitante la malfruan horon
 Kaj plenigante mian tutan koron,
 Per viaj paŝoj, je nigra malĝojo,*

*Kiu vi estas ? Kien vi rapidas ?
 Ĉu al volupto, al amo, al morto ?
 Ĉu al la serĉo de la lasta vorto
 Kiun mortanto nun al vi konfidas ? . . .*

*Nenion ja mi scias; sed malkaŝas
 Koron doloran la paŝo tremanta.
 Kaj mi pripensas, kun koro batanta,
 La larmojn kiujn vi, ho nokto, kaŝas.*

D-ro Vincenzo Musella.

Nokto en Ĝardeno

*Alte en ĉielo, en lazuro fora,
 Helfabelojn teksas lun' en solpromeno.
 Florojn kaj arbustojn, vojojn de
 l'ĝardeno—
 Ĉion silkvualas ĝia bril' fosfora.*

*Kaŝe ĉe l'vojrando, en ŝirmejo flora,
 Nevidebla gril' ĉirp-ĉirpas kun
 kortremo.*

*Perlas tra l'silento ĝia tinta ĝemo.
 Ĉien disruliĝas ĝia tril' sonora.*

*L'arbfoliaj ĥoroj mutas en kvieto.
 Sen ekmov' rigidas ĉiu herbtrunketo.
 Ne kliniĝas kronoj de l'florar' parfuma.*

*Ĉio pacas, kvazaŭ ĉio sen ekspiro
 La lunon kaj grilon ĝuas kun admiro
 En ĉi nokto trila, en ĉi nokto luma.*

Boĵidar Vanĉik.

En Mia Mio

*En mia mio kaŭris infaneto,
 kvazaŭ en ĉambro vasta kaj obskura,
 timante eĉ per timlament' murmura
 provoki la koleron de l'kvieto.*

*Kaj vi hezite tra la ombroreto
 alvenis kiel orfo malsekura
 al mia ĉambro kava kaj terura ;
 kaj antaŭ vi forfuĝis la obsedo :*

*fide mi vin salutis ĝojmiene
 ĉar via ĝojmieno pruvis plene,
 ke en mi simpation vi rekonas,*

*kaj nun ni kune vagas lok-al-loke
 en la malluma dom', kaj reciproke
 kuraĝon ĉerpas kaj kuraĝon donas.*

William Auld.

D-ro Ivo Lapenna :

Centro de Esploroj kaj Dokumentado (C.E.D.) de U.E.A.

LA 1-an de Januaro 1952 ekfunkciis nova, tre grava institucio de nia organizaĵo kaj de la tuta movado: la Centro de Esploroj kaj Dokumentado. Ĝian fondiĝon decidis la Komitato de U.E.A. dum unu el siaj kunsidoj en Munkeno, en Aŭgusto pasintjara. Estis necesaj pluraj monatoj por solvi ĉiujn teknikajn kaj organizajn demandojn, por havigi la minimumajn financajn rimedojn kaj por krei tiamaniere la necesan solidan bazon, sur kiu la Centro povos kreski kaj evoluigi sian aktivecon. Nun la ĉefaj malfacilaĵoj estas venkitaj kaj la movado posedas novan fortan batalilon en siaj manoj.

La celo de la Centro estas triobla: sciencaj esploroj, dokumentado kaj informado. La unua branĉo ampleksos precipe diversajn studojn—lingvistikajn, sociologiajn, psikologiajn kaj politikajn—pri la Internacia Lingvo, pri ĝia apliko sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco kaj pri la moralaj kaj intelektaj efikoj de tiu aplikado. En la kadro de la dua branĉo estos efektivigitaj gravaj laboroj koncerne kolektadon kaj enregistradon de la ĉefaj dokumentoj rilate al la Internacia Lingvo. La tria branĉo utiligos la laborojn faritajn de la du unuaj por verkado de artikoloj kaj disertacioj (sendotaj pere de la kunlaborantoj al nacilingvaj sciencaj, artaj, literaturaj kaj fakaj revuoj), kunmetado de tipaj prelegoj por diversaj okazoj kaj diversaj medioj, verkado de alvokoj kaj flugfolioj, aktiva partoprenado en ĉiuj internaciaj medioj, kiuj pritraktas la

lingvan problemon, interŝanĝado de dokumentoj kaj informoj kun UNESKO, UNO kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj, liverado de konvena materialo al la landaj kaj fakaj asocioj kaj precipe al la informaj servoj.

Por la realigo de siaj celoj la Centro klopodos utiligi ĝis plej alta grado ĉiujn intelektajn kaj moralajn fortojn, pri kiuj nun disponas la movado. Tamen, tute aparte estos necese aktivigi tiujn elstarajn personojn, kiuj pro diversaj kaŭzoj—antaŭ ĉio pro siaj profesiaj laboroj—ne partoprenas la vivon de niaj organizaĵoj, sed kiuj estas pretaj kree kontribui al la celoj de la Centro aŭ kies socia pozicio, personaj rilatoj, profesiaj laboroj, k.t.p., ebligas utilan helpon al la klopodoj de la Centro en diversaj medioj (sciencaj, artaj, sindikataj, trafikaj, turismaj, politikaj, k.t.p.). Pluraj tre elstaraj Esperantistoj jam fariĝis kunlaborantoj kaj ili jam komencis la laboron laŭ la plano ellaborita de la Centro. Iom post iom tiu reto de kunlaborantoj larĝiĝos. Estas necese akcenti, ke la kunlaborado en la kadroj de la Centro estas tre elasta kaj libera de ĉia ajn burokratismo. Temas pri personoj, kiuj profunde kredas je Esperanto, je ĝia kultura signifo kaj paciga rolo kaj kiuj libervole disponigas al la C.E.D.—kaj pere de ĝi al la afero de la Internacia Lingvo ĝenerale—siajn kapablojn, scion, fakan reputacion, tempon kaj energion. Ilian aktivecon reguligos nur tri fundamentaj principoj: plena libereco en la amika

interŝanĝado de pensoj, nepra plenumo de la akceptitaj taskoj kaj reciproka helpado.

Neniu laboro estas farebla sen financaj rimedoj. Kvankam ĉiuj kunlaborantoj—de la direktoro ĝis la getradukantoj por la diversaj lingvoj—faras ĉion honorofice, do senpage, tamen por iom taŭge kaj digne organizi la aferon estas necesaj almenaŭ minimumaj financaj rimedoj. Tiucele U.E.A. disponigis el sia propaganda konto £200. Pluraj geesperantistoj, aŭdinte pri la formiĝo de la Centro, deziris montri sian fidon je la graveco de la afero kaj helpi ĝian realigon per mondonacoj. Ĝis la 25-a de Novembro ili kontribuis pliajn £126 13ŝ. 0p. (anglajn). La donacintoj estas: Novzelanda Esperanto-Asocio, Gesinjoroj Holmes el Londono, D-ro I. L., Londona Esperanto-Klubo okaze de la prelego de D-ro I.L., F-ino Skeate el Londono “al la memoro de la Bravuloj de Jugoslavujo”, S-ro C. Thollet el Maroko, S-ro J.M.B. el Glasgovo, S-ro Kennedy el Bishop Auckland, S-ro E.C.S., S-ro R. Schwartz el Parizo, S-ro J. Dussausoy el Parizo. U.E.A. ŝuldas al ili kaj al ĉiuj, kiuj estontece kontribuos finance por la celoj de la Centro, sian tutkoran dankon.

* * *

En sia pli ol sesdekjara ekzistado la Esperanto-Movado montris admirindan vivkapablon. Ĝin ne detruis la skismo, nek la du grandaj mondmilitoj, nek diversaj tiranecaj reĝimoj, nek la konstraŭstaro de gravaj aŭtoritatoj, nek — ni estu sinceraj al ni mem—tre ofte niaj propraj eraroj. Batita kaj terenĵetita, ĝi ĉiam trovis forton por releviĝi; ignorata, ĝi ĉiam sukcesis denove aŭdigi sian voĉon; forlasata de siaj adeptoj, ĝi ĉiam akiris novajn

entuziasmajn batalantojn. Granda ideo kaj nobla idealo, por kiu oni oferadis, por kiu oni suferadis, por kiu oni eĉ mortadis! Kaj tio ne estas nuraj frazoj, sed bedaŭrinda realaĵo. Movado, kies vojo al la altaj celoj estas markata eĉ per la sango de Martiroj, tia movado tute certe ne povas pereii.

Sed inter ne pereii kaj venki estas diferenco. Kaj ni volas ne nur ne pereii. Ni ankaŭ volas definitive venkigi la aferon. Por atingi tion, oni devas aldoni ankoraŭ multe da scio kaj da energio al la jam ekzistantaj vervo kaj entuziasmo. Tiun truon klopodos plenigi—kun la helpo de ĉiuj, kompreneble—la ĵus fondita Centro de Esploroj kaj Dokumentado.

Estas certè, ke ĝi havos la apogon de la tuta movado.

Estas espereble, ke jam en la sekvantaj 10–15 jaroj—agante plane, celkonscie kaj harmonie—ni povos grandparte realigi nian idealon: la praktikan aplikon de Esperanto en ĉiuj internaciaj rilatoj.

Estas nur nepre necese, ke ni mem kredu kaj fidu je niaj propraj fortoj!

Noto: La sidejo de la Centro estas en Londono. Provizore bonvolu direkti ĉiujn leterojn al la privata adreso de D-ro Lapenna: 300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo.

(daŭrigo de p. 7)

Elaliajlandoj oni akceptos individuajn studentojn. La konferenc-temoj estas:

- (1) Aktualaj problemoj por studentoj kaj altlernejoj.
- (2) Fondiĝo de internacia asocio por esperantistaj studentoj kaj altlernejoj.

Por informoj oni skribu al I.K.E.S.A. prepar-komitato, Laksegade 35, København K., Danlando.

Studentoj kaj Esperanto

DUM la lastaj jaroj intereso pri Esperanto komencis bone kreski inter la studentaro. En la Jarlibro 1951 (2-a parto) kaj en diversaj numeroj de la gazeto ni raportis pri la instruado de Esperanto ĉe diversaj seminarioj (t.e. por estontaj geinstruistoj). En la Novembra numeroniraportis pri la por-studentaj arkeologiaj tendaroj en Danlando.

En Aprilo 1951 aperis la unua numero de revuo *La Studento*. En Oktobro aperis la dua. Laŭ formato simila al *Esperanto*, ĝi estas ilustrita, kaj bone presita sur bona papero. La eldonistoj estas la Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejoj kaj la Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhago: la redaktoro S-ro J. Vesterland-Andersen. (Ĝi aperos 6-foje jare: kosto 1 usona dolaro aŭ egalvaloro: ĉe Lakesgade 35, København K., Danlando.) Kiel la titolo indikas ĝi ne taŭgas—ĝi ne celas taŭgi—al ĉiuj lernejoj, sed por la pli aĝaj ĉe altlernejoj kaj ĉe universitatoj ĝi estas rekomendinda.

En la Studenta Esperanto-Klubo (SEK) en Kopenhago (fondita en Aprilo 1949) nun estas 55 membroj: ne malbona nombro kiam oni konsideras la limigitan kampon prilaboratan. Kaj tiu Klubo bone laboras.

De 1 Septembro ĝis 18 Oktobro 1951 okazis granda ekspozicio en la restoracio de la Kopenhaga Universitato. En 40-metra vitra montrilo oni klarigis pri Esperanto, pri ĝia gazetaro kaj pri ĝia literaturo. Duono de la ekspozicio montris la praktikan aplikon de Esperanto por studentoj kaj altlernejoj: tiu parto temis pri sciencaj eldonaĵoj kaj pri la internaciaj arkeologiaj tendaroj.

Je la 26-a de Septembro *rector magnificus* ĉe Universitato Kopenhaga, universitata profesoro, filozofia doktoro H. M. Hansen kune kun la ĉefsekretario ĉe la Universitato, Olaf Waage, vizitis la ekspozicion. Poste SEK havis la plezuron regali la eminentajn gastojn per *Vodka* (brando) el Jugoslavujo, donaco al SEK de la ĵus fondita studenta klubo en Ljubljana.

La Septembra numero de la oficiala studenta gazeto de la Universitato *Studenterbladet* enhavis tutpaĝan ilustritan artikolon pri la laboro de SEK—cetere la Kopenhagaj tag-jurnaloj raportis pri la ekspozicio, k.c. Krome, SEK eldonis plurajn milojn da danlingvaj afiŝetoj, reklamiloj, k.t.p. Rezulto ĝisnuna: du studentaj kursoj por komencantoj, unu por progresintoj, kaj studrondo.

* * *

Oni nun anoncas ke Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj okazos en Schluchsee, Germanujo, je 17–24 Aŭgusto 1952. La invitantoj estas:

Allg. Studentenausschuss-Ausland-sreferat (ASTA) der Universität Freiburg i. Br.

Deutsche Esperanto-Jugend (Germana Esperanto-Junularo).

Studenta Esperanto-Klubo, Freiburg.

La preparkomitato konsistas el: J. Vesterland-Andersen (Redaktoro *La Studento*) Kopenhaga SEK.

Michel Schmidt (aranĝinto de la Konstanz-semajno 1951).

Krajl Drago, de la Ljubljana SEK.

La konferencon povos partopreni delegitoj el landoj, kie ekzistas studentaj aŭ universitataj organizaĵoj.

al piedo de p. 6



Oslo Vokas Vin!

Adreso : Box 942, Oslo, Norvegujo.

Bankokonto : Nen Norske Creditbank No. 6099 B/179.

Poŝtgirokonto : 153. 85.

Grave : La LKK volas averti Esperantistojn kontraŭ senrespondaj privataj aranĝoj de postkongresaj kaj antaŭkongresaj renkontiĝoj. La fokuspunkto de la aŭtuna Esperantista vivo estas la U.K. kaj aliaj aranĝoj ligitaj aŭ ligotaj kun tiu festo devus okazi en la kadro de tio aŭ interkonsente kun la organizantoj. Aranĝoj de privata iniciato povos kaŭzi konfuzon, kaj cetere povos konkurenci kun la aranĝoj de LKK. Tiaj aranĝoj cetere kaŭzas disperdon de energio kaj de mono. Lojale subtenu la U.K. Konsultu LKK antaŭ ol fari aranĝojn.



Komuna manĝado : LKK intertraktas kun grava entrepreno en Oslo

pri komuna manĝado kaj la aranĝoj estas preskaŭ kompletaj. Prezojn kaj kondiĉojn ni donos en venonta komuniko.

Amasrestejo : LKK sukcesis rezervi 300 litojn po 150 en 2 lernejoj. Prezojn kaj kondiĉojn ni anoncos.

Statistiko : Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 3, Brazilo 1, Britujo 30, Danlando 8, Finnujo 1, Francujo 12, Germanujo 12, Italujo 6, Izraelo 1, Jugoslavujo 4, Nederlando 10, Norvegujo 60, Pollando 2, Portugalujo 1, Ruslando 1, Svedlando 17, Svislando 4, Usono 1. Sumo 179 el 21 landoj. (en Novembro).

Mason Stuttard, K.K.S.



Mapo skulptita el bastono
(Angmagssalik, Grenlando)

KARTAĴ ENCIKLOPEDIO (Kulturhistoriaj kuriozaĵoj)

16 kartoj jam aperis
kaj kostas 2ŝ.
afranko 2p.

Mendu ĉe: U.E.A.
Heronsgate,
Rickmansworth,
Anglujo

Bøye Skeie :

La norvega popolmuzeo en Oslo

IAFOJE oni sentas la deziron forkuri for de la bruantaj stratoj kun tramoj, aŭtomobiloj kaj miloj da homoj, ĉiam rapidantaj. Estas io interne en la homo, kio ne longe volas partopreni en tiu sorĉa danco. Almenaŭ dum mallonga tempo oni devas esti for de la formikejo, for de la trafiko kaj la rapido.


Oni do eniras aŭtobuson, kiu surhavas la ŝildon "Bygdø" kaj post dek minutoj estas ekster la granda urbo.

La pejzaĝo rapide ŝanĝiĝas. Apud la vojo oni vidas aŭto-riparejojn kaj gastejojn, sed subite oni preterpasas grandajn kultivitajn kampojn kaj herbejojn. Malnova aleo ĵetas malvarmetajn ombrojn sur la vojon, kaj baldaŭ oni vidas belegan bienon. Ĝi

estas pli bone konservita kaj pli noblaspekta ol bienoj kutime estas. Kiu do posedas ĝin? Estas la reĝo. La norvega reĝo estas vigla agrikulturisto. La bieno estas modela farmejo. Ĉiun printempon la reĝo transloĝiĝas tien de la palaco en la urbo kaj loĝas tie dum la tuta somero.

Oni pluveturas. La aŭtobuso haltas antaŭ malnova urbpordego. Oni eliras la aŭtobuson kaj eniras tra la pordego. Tie staras diversaj grandaj domoj el betono ĉirkaŭ granda placo. La penso sin trudas, ĉu oni veturiĝis de unu urbo nur por eniri alian?

Sed, se oni daŭrigas sian vojon oni trovas ankaŭ la eliron el ĉi tiu urbo. Oni trovas tion, kion oni serĉas, ĉarmajn vojetojn, silenton kaj



trankvilon. Dum la irado oni certe renkontas aliajn homojn, sed tiuj estas homoj, kiuj serĉas la saman, kiel vi.

Neatendite, jen troviĝas malgranda farmejo. Tio ne multe similas al tiu reĝa bieno, kiun vi ĵus preterpasis. La domoj staras en du vicoj laŭlonge de mallarĝa korto. Veninte al Setesdal, oni malantaŭeniras ĝis la jaro 1700. (Setesdal estas mallarĝa valo en la suda parto de Norvegujo).

Ĝis la jaro 1800 multaj homoj en la norda parto de la valo loĝis en malgrandaj unuetaĝaj domoj. Ili ne havis fornojn, sed faris la fajron sur ŝtonoj en la mezo de la tera planko en la ĉambro. La fumo malaperis tra truoj en la tegmento. Tra tiu sama truo ankaŭ la taglumo ŝpareme envenis, ebligante vidon al la tabloj, litoj kaj benkoj, faritaj el grandaj trabo, sed kun belaj formoj kaj eltranĉitaĵoj. Tio montras, ke eĉ tiuj homoj deziris havi belajn domojn.

En kelkaj aliaj domoj en la korto oni trovas pli riĉajn eltranĉitaĵojn precipe en la domo nomita "loft". En la unua (tera) etaĝo oni konservis la manĝaĵojn, kaj en la dua festvestojn kaj aliajn multekostajn posedaĵojn. La arkitekto kaj la ĉarpentisto faris altkvalitan laboron, kaj kun la mezepokaj ornamaĵoj tiuj domoj atestas, ke la homoj jam en tiu tempo posedis altan domkulturon.


De Setesdal oni antaŭeniras al aliaj malnovaj farmejoj.

En Numedalstunet troviĝas Raulandsstua, unu el la plej malnovaj lignodomoj konservitaj en Skandinavio, konstruita proksimume en la jaro 1300 ! Sube de la pordo estas eltranĉitaj la malnovaj runsignoj, kaj la pordo mem estas riĉe ornamita.

En domo de Hardanger la tablo estas preta por geedziĝa festo. Grandaj buterujoj, bierpelvegoj, "Rømmergraut"* kaj "Lefse"* donas

* "Rømmergraut" estas kaĉo farita el faruno kaj acida kremo.


* "Lefse" estas tute speciala maldikega pano kamparana.



la impreson, ke nun okazas festeno kaj ke oni estas bonvena.

Se oni laciĝas de la irado de domo al domo (tie troviĝas pli ol cent diversaj malnovaj domoj!) ripozu iom en la sunbrilo aŭ en la ombro sub la verdaj arboj. Certe la veterharditaj, sunbruligitaj lignomuroj volas rakonti ion pri la vivo en la malnova farmejo dum laboro kaj festo en la diversaj partoj de la jaro. Aŭ eble oni volas aŭskulti birdojn, kiuj kantas sur la arbopintoj, kaj rigardi la malgrandajn florojn, kiuj faras al oni kapsignon de la torftegmento de la proksimaj domoj. Ĉie estas paco!

La vizitanto devas vidi alian specialan domon antaŭ ol forlasi la muzeon: Stavkirken, la preĝejon de la 12-a jarcento. Sur pinto de deklivo oni trovas ĝin, malgrandan sed fantazian. La rigardo vagas supren de tegmento al tegmento. Ĝi trovas la vojon al la strangaj drakkapoj, kiuj ornamas la pintojn de la tegmentoj. Tra mallarĝa pordo kun fantaziaj eltranĉitaĵoj oni venas al la interno. Tie estas preskaŭ mallume. La malgrandaj lumtruoj supre tuj sub la tegmento permesas nur al kelkaj lumradioj enveni. Iom post iom, kiam la okuloj estas al kutimiĝintaj al la krepuskeco, oni malkovras la detalojn de la interno. La grandaj kolonoj, kiuj portas la tutan tegmenton, finiĝas je strangaj maskoj. La kolonoj estas rigidigitaj laŭ speciala maniero. Oni rimarkas, ke tio estas teknike alta konstruaro. Apud katedralo la preĝejo ŝajnas malgranda, sed tie ne estas la amplekso, kio impresas. Estas la simpla kaj la vero, kio tuŝas la rigardanton. Fine haltu antaŭ la malgranda, naiva pentraĵo super la altaro. Tiu ne estis



granda artisto, kiu laboris tie, sed ia kampara laboristo, artisto, kiu donis ĉion, kion li kapablis. Tiu pentraĵo precize konvenas al la interno.

Antaŭ ol forlasi la popolmuzeon, oni vidu la enhavon de la grandaj betonaj domoj. Tie troviĝas ekspozicioj kun kolektaĵoj el ĉiu parto de la lando. Tie oni trovas meblojn de la kamparo kaj de la urbo, teksaĵojn, instrumentojn, ilojn, naciajn kostumojn kaj multajn aliajn objektojn. Eniru ankaŭ tien!

Bonvenon!

(Ĉi tiun artikolon, verkitan speciale por *Esperanto*, de fakestro de la popolmuzeo, tradukis Maria Fjaerem. Apartan dankon ni esprimas al la popolmuzea instanco pro la prunto de la kliŝoj.—Red.)

D-ro P. Kempeneers :

Bruligaj Bombadoj

Studoj estis farataj post la milito pri la rezultoj de la amasbombĵetadoj sur la urbojn. En la medicina gazeto *La Presse Médicale** mi trovis kelkajn detalojn ĉerpitajn el diversaj raportoj pri tiu temo. El ili mi ĉerpas tiujn pri *bruligaj atakoj*.

Rimarkindaj estis subiteco, rapideco kaj grandegeco de la katastrofo. Atakoj estis farataj de grupoj de 500 ĝis 1.000 aviadiloj, kiuj sekvis unu la alian, kiel ondoj, kaj ekbruligis multenombrajn fajrojn. Oni kelkfoje citas ciferon de 16.000 bruloj por unu atako. Ventego kaŭzita de la altiro de la ekstera aero al la brulantaj konstruaĵoj kunigis la brulojn el kiuj ĉia vivo malaperis.

La graveco de tiuj bruligaj bombadoj estas montrata de la sekvantaj ciferoj :

En Anglujo, Londono kaj la plimulto de la grandaj urboj de la suda marbordo—Plymouth, Southampton, Portsmouth—kaj ankaŭ la centro de la lando—Liverpool, Manchester—estis trafitaj. Oni kalkulas, ke almenaŭ 1 konstruaĵo el 5 estis trafita. Dum la atako sur la Londona civito (29 dec. 1940) la germanaj aviadistoj ĵetis 100.000 bruligajn bombojn, kiuj okazigis 1,500 brulojn.

En Germanujo la britaj kaj usonaj aeratakoj detruis 3.600.000 konstruaĵojn, t.e. kvinono de la tuto. En 49 grandaj urboj 2.164.000 loĝejoj el 5.500.000 estis bruligataj aŭ faligataj. Oni

* N-ro 52, 19 aŭg. 1950.

opinias, ke 300.000 enloĝantoj estis mortigataj (ne enkalkulante 300.000 en Dreseno, sed tiu cifero ne estas certa), 780.000 estis vundataj, 7.500.000 enloĝantoj perdis sian loĝejon. Tri atakoj al Hamburgo (julio, aŭgusto 1943) efektivigitaj de po 700 aviadiloj, mortigis de 60.000 ĝis 100.000 loĝantojn kaj detruis 253.000 el la 450.000 loĝejoj. Bombado de Pforzheim daŭris 20 minutojn kaj mortigis 30.000 el la 80.000 enloĝantoj.

En Japanujo atako al Tokio (10 marto 1945) mortigis 84.000 loĝantojn kaj detruis 3/4 de la urbo. Atako al Kobe (17 marto 1945) detruis loĝejojn de 240.000 personoj. Laŭdire en ĉiuj japanaj urboj 165.000 personoj estis mortigataj, 200.000 vundataj, (sed laŭ usonaj kalkuloj tiuj ciferoj devus esti 900.000 mortigitaj kaj 1.300.000 vunditaj) kaj 8 milionoj restis sen loĝejo.

La detruaj atakflugoj komenciĝis en marto 1945. Ilin efektivigis grandaj bombadiloj B.29. Ili ne alvenis en grandaj grupoj, kiel la japanoj ilin atendis, sed ili ekaperis je malgranda alteco unuope aŭ triope el ĉiuj direktoj je interspacoj de 20 ĝis 45 sekundoj, dum 2 aŭ 3 horoj. Sesdek urboj estis pli malpli bruligitaj en daŭro de kelkaj monatoj ; 45% el tiuj atakataj estis detruataj.

Tio ja donas ideon de tio, kion travivus la homaro en la okazo de nova “lasta” milito !

Prof. Edmond Privat :

Antikva pacifisto *la Hinda imperiestro Aŝoka*

KELKAJ aŭdintoj de mia parolado dum la malfermo de la Kongreso en München min demandis pri la hinda reĝo aŭ pli ĝuste imperiestro Aŝoka, ĉar mi lin menciis. Efektive mi bedaŭras ke niaj okcidentaj lernejoj instruas multon pri Napoleono, Cezaro, Aleksandro, Daro, Ciro aŭ aliaj militistoj, sed neniom pri granda pacifisto kiel Aŝoka.

Li regis Hinduojn tri centjarojn antaŭ la tempo de Jesu-Kristo, kaj ankoraŭ nun oni admiras en lia lando plurajn ŝtonajn rokojn aŭ kolonojn, sur kiuj li enskribigis tre rimarkindajn konsilojn al siaj popoloj en la post-sanskrita lingvo *pali*.

Li fariĝis fervora Buddhisto kaj post sia konvertiĝo li rezignis militon por ne mortigi homojn-fratojn kaj ankaŭ ĉasadon por ne buĉi bestojn pro nura plezuro.

Kvankam li mem havis tre precizan kredon, li severe malaprobis, ke oni malbone parolu pri la kredo de la ceteraj homoj. En la enskribaĵo de Girnar staras lia rekomendo :

“Lia Moŝto respektas ĉiujn sektojn, kaj per donacoj honoras ilin, sed tiaj donacoj ne valoras al liaj okuloj tiom, kiom la kresko de la esenca progrese spirito en ĉiuj Oni devas respekti la sektojn de aliaj homoj . . . Kiu respektas nur la sian kaj kalumnias la kredon de la ceteraj, fakte malutilas al sia propra kredo.”

En la enskribaĵo de Jaŭgada la teksto estas jena : “Ĉiuj homoj estas kvazaŭ miaj propraj gefiloj kaj, same kiel mi deziras por miaj infanoj feliĉon kaj prosperon en tiu ĉi mondo kaj poste, same mi tion deziras por ĉiuj homoj. Eble la popoloj najbaraj ĉe niaj landlimoj demandas : Kion volas la reĝo pri ni ? Nu, mi deziras ke ili komprenu, ke la reĝo nur volas ilin liberaj je ĉia timo pri mi, ke ili fidu je mi kaj sciu, ke ili ricevos de mi nur feliĉon kaj ne ĉagrenon.”

En la enskribaĵo de Ŝahbazgarhi la reĝo pentas pri sia venko antaŭ ok jaroj antaŭ ol sia religia konvertiĝo : “Lia Moŝto pentas pri sia venko sur la Kalinganoj, ĉar kiam sendependa lando estas perforte venkita, tiam okazas buĉado, mortigoj kaj kapto de homoj. Ĉion tian la reĝo nun konsideras ĉagreniga kaj malaprobinda . . . La morala venko de si mem sur si mem estas konsiderata de lia Moŝto kiel la plej valora.” En aliaj enskribaĵoj Aŝoka malkonsilis la mortigon de bestoj, eĉ la oferon de bestoj en preĝejoj kaj ordonis planti utilajn arbojn por havigi medicinaĵojn al siaj popoloj kaj ankaŭ al la najbaraj nacioj. Amikecon kaj helpemon li rekomendis al ĉiuj hejme kaj eksterlande.

Komparu tion kun la gloraj kolonoj aŭ triumfarkoj de la Okcidento pri bataloj, kaj vi rajtos bedaŭri, ke niaj infanoj ne aŭdas eĉ unu vorton pri Aŝoka en la lernejoj, kvankam li estis unu el la plej famaj personoj en la historio de Azio.

Niaj Kunlaborantoj


**Otto Walder, Komitatano de U.E.A.,
Ĉefdelegito en Svislando.**

FENOMENO de la homo estas lia deziro vojaĝi, vidi nekonatajn landojn, kutimojn, popolojn. En ĉiuj tavoloj de la socio troviĝas tiu sopiro al la vasta mondo “preter la horizonto”. Tiu sama sopiro instigis Otto Walder en 1933 lerni Esperanton, malgraŭ la tiamaj senlaboreco kaj neesperiga situacio. Lin gajnis por la movado provleciono de S-ro T. Morariu.

Ankoraŭ juna (naskiĝis 1912) li baldaŭ montris administrajn talentojn kaj jam en 1937 estis Prezidanto de Esperanto-Societo Bern kaj Kasisto de la grupo Romanshorn. En 1939 li sekretariis por la tiujara Universala kongreso en Bern. Kiel ĈD de I.E.L./U.E.A. li funkcias de 1938.

Laŭ profesio lokomotivestro, S-ro Walder tamen trovas tempon flegi sian ĝardenon kaj okupi sin je fotografio.

Ofte okazas, ke kursoj havas sekvojn. En kurso de li gvidata, trafis nian samideanon la romantiko! Kun kursanino sia li poste edziĝis, kaj nun li estas patro de tri ĉarmaj filinoj.



Per siaj bonhumoro kaj prudento S-ro Walder scias ekspluati situaciojn por la profito de nia komuna afero, kaj plenumante multajn funkciojn en la Esperanto-movado, li faras konkretan kontribuon al nia movado kaj enlande kaj internacie.

M.S.



El la Oficejo

Salutojn! Okaze de la kristnaska festo kaj la nova jaro envenis en la Centran Oficejon de U.E.A. tre multaj salutoj. La Ĝenerala Sekretario kaj la aliaj geoficistoj deziras esprimi al ĉiuj salutintoj—kaj al ĉiuj aliaj samideanoj—tre sincerajn bondezirojn por

ĉio bona en 1952. Ili bedaŭras, ke pro premo de laboro estas neeble respondi aparte al ĉiu.

Kotizoj. Ni atentigas niajn legantojn, ke ĉi tiu numero estas sendata al ĉiu MA aŭ abonanto de 1951. **La Februaran ricevos nur tiuj, kiuj pagis la kotizon 1952.** Se vi ankoraŭ ne pagis, sed deziras eviti interrompon en la livero de la gazeto, bonvolu pagi TUJ.



Por via distro

Sendu vian plej amuzan anekdoton al M. Otiel, ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Antaŭdankon

Nigra almenaŭ !

Sinjoro : Mi petas, alportu al mi tason da kafo . . . kafo sen kremo.

Kelnero : Mi tre bedaŭras, sinjoro, sed kremon ni hodiaŭ ne havas. Mi povas alporti nur kafon sen lakto !

Se du agas same

Se viro estas parolema oni diras pri li, ke li estas "boninspirita". Se virino parolas multe ŝi estas "klaĉulino".

Se viroj sidas kune dum horoj ili estas en "konferenco". La samo ĉe virinoj estas nomata "te-klaĉado".

Viro grizhara havas "interesan aspekton". Virino tia estas tute simple "la maljunulino".

Se viro en societo daŭre restas apud la edzino li estas "edzo atentema". Se ŝi same faras, ŝi estas "ĵaluza drako".

Viro elspezema estas "larganima". Virino tia estas "malŝparulino ne scianta kalkuli".

Se li estas ŝparema li estas "prudenta familia patro". Se ŝi ŝparas oni nomas ŝin "avarulino".

Kio estas via V.-K. ?

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Nov-Zelando.

Divenu la ĝustajn en la signifoj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto aŭ nescio. (Respondoj sur p. 32)

1. **Konstelacio** : (a) stato de maltrankvilo, (b) speciala grupo da steloj, (c) fundamenta leĝaro ?
2. **Kurento** : (a) fluo de elektro, (b) ĉiutaga ĵurnalo, (c) freŝdata, (d) sekvinbero ?
3. **Laŭreato** : (a) ĉiamverda arbeto, (b) medikamento, (c) gajninto de premio ?
4. **Farmacio** : (a) biendomo, (b) terkulturado, (c) scienco pri medikamentoj ?
5. **Mercero** : (a) speco de metalo, (b) komerco per objektoj kiel butonoj, fadenoj, k.t.p., (c) saĝa konsilanto ?
6. **Oksido** : (a) gaso, (b) postkranio, (c) kombinaĵo de oksigeno kun alia elemento ?
7. **Ofendo** : (a) kolerigo, (b) mallaŭdo, (c) ekbatalo ?
8. **Prioro** : (a) floro, (b) ĉefo, (c) estro de monaĥejo ?
9. **Sarkasmo** : (a) akra moko, (b) marherbo, (c) pesimismo ?
10. **Ŝakto** : (a) vasta lana tuko, (b) speco de sovaĝa hundo, (c) profunda vertikala puto ?



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

***La skulptaĵoj sur la Vigeland-ponto** de Karl S. Kjaer. Esperanta teksto de R. Bugge-Paulsen ; franca teksto de J. H. Rosbach. Eldonis Abels kunstforlag, Oslo. 27.5×21.5cm. 42 p., kart., sur arta papero, prezo 8ŝ. 6p., afranko 6p.


Kompare malmultaj geniuloj havas la kontenton scii, ke ilia verko estas ŝatata kaj agnoskata — krom en limigitaj rondoj. Ke al ili estu disponigitaj la rimedoj por la grand-skala efektivigo de sia krea fantazio, tio estas ebla nur en socio kun alta grado de civilizo kaj kulturo. Tamen tion atingis Gustav Vigeland, kaj en Frogner-parko en Oslo staras la grandioza kaj impona monumento al lia genio. Frogner-parko fakte estas la monumento—ampleksa tereno de li planita, kun grandega aro da skulptaĵoj en bronzo kaj granito.

En 1950 aperis verko de Karl S. Kjaer (kunlaborinto de Vigeland) pri unu sekcio de la Vigeland-verkaro, pri la “ponto” en la parko. La sukceso de tiu eldono (kun norvega kaj angla tekstoj) estis tia, ke jam en 1951 dua eldono estis postulata ; kaj profitante tiun okazon, samideanoj en Oslo persvadis la aŭtoron aperigi ankaŭ eldonon kun teksto Esperanta. La jena libro kun ankaŭ franca teksto estas la kulmino de tiu klopodo, des pli salutinda en la kongresa jaro.

Pri la skulptaĵoj mem—ĉiuj nudaj figuroj—povas esti, kaj certe estos, diverso de opinio. Kiel aliaj pensuloj siatempaj kaj alitempaj ankaŭ Vigeland priokupiĝis pri la konflikto

inter spirito kaj karno en la homa psiko. La jena verko donas nur malgrandan impreson pri la verkaro de Vigeland, kaj observanto de la tuto mem en la Frogner-parko ricevas la impreson, ke la verkisto estas iom pesimisma pri la homo. Precipe je rigardo de lia bildigo de la vivocirklo de la homo, oni ne povas ne pensi pri la filozofio nigra de Anatole France en *Insulo de la Pingvenoj*.

Cedante, ke la sintrudo de la postuloj de la karno en la nuna evolustadio de la homo estas grandega,



*Juna viro kaj juna virino en ringo
(kliŝon afable pruntis la eldonejo)*

oni povas (ĉu rajtas?) atendi de granda artisto ian indikon al pli alta stadio kun mesaĝo de espero pri la estonteco de la homaro. Oni tamen vole nevole havas la impreson, ke Vigeland iom tro priokupiĝis pri la karno, sed ne havis fidon je la homa volo kaj la homa spirito. La klarigoj de la aŭtoro ne ĉiam estas helpaj, sed kelkloke iomete odoras je la “artĵargono” ofte uzata en diversaj artrondoj kaj kiu estas nur altefluga strebo al efekto, sed nenion konkretan diras. Cetere la verdiktoj de Kjaer pri la celo kaj mesaĝo de Vigeland estas subjektivaj (malgraŭ tio, ke li estis kunlaboranto de la skulptisto, kaj tial verŝajne intime konis lin) kaj jam aŭdiĝas en diversaj artrondoj kritiko pri la interpreto de Kjaer.

Presite sur artpapero kun 76 unuarangaj bildoj kaj foto de la skulptisto, la libro devus esti sur la bretoj de ĉiu artamanto. En la nuna epoko, kiam ni pli kaj pli emfazas la kulturan kaj socian rolon de Esperanto oni ne povas tro laŭdi la aperon de ĉi tiaj verkoj, kiuj antaŭ intelektuloj kaj kulturhomoj pledas pli forte por nia afero ol horoj da parolado.

Pri la Esperantaj tekstoj oni povas ĝoji, ke tiu tasko estis en la manoj de Akademiano; kaj kie la stilo iomete diverĝas de la pure modela, tio verŝajne estas pro klopodo redoni la originalan stilon de la aŭtoro.

Plene rekomendinda verko.

Mason Stuttard.

***Aspekto de Islando**, teksto de Ingimar Oskarsson. Eld. Isafoldarprentsmidja H. F., Reykjavík, Islando. 18.5×25.5 cm. 96 paĝoj ilustritaj., prezo broŝ. 23ŝ. 6p., afranko 6p.

Islando sendube apartenas al tiuj landoj, kiuj estas tre malmulte konataj

de la cetera mondo. Konversaciante pri ĝi oni povas aŭdi—eĉ en t.n. kleraj medioj—jenajn demandojn: kies kolonio ĝi estas? ĉu tie ekzistas telefono? ĉu la homoj estas vestitaj kiel “en Eŭropo”? k.s.

Estis, do, tre bona la ideo eldoni libron, en kiu per multnombraj fotoj kaj mallonga klariga teksto estos prezentita tiu mirinde bela kaj el ĉiuj vidpunktoj interesa lando.

La libro enkonduke donas kelkajn geografiajn kaj historiajn informojn. En la cetera parto estas tre trafe prezentitaj la naturaj belaĵoj de la insulo, ĝiaj vulkanoj kaj gejseroj, la altaj montoj kaj nigraj rokoj, la arĝente ŝaŭmantaj riveroj formantaj ofte sovaĝajn kaskadojn, la mildaj ebenaĵoj kaj eternaj neĝoj. La leganto (kaj rigardanto) estas kondukata en la multnombrajn havenojn, al fiŝkaptado, al fojnorikolto kaj ŝafbredado. Multaj ekmiros vidante vinberojn, akvomelonojn kaj aliajn sudeŭropajn fruktojn kaj kreskaĵojn prosperi en tiu tre norde situata insulo. Tiuj kreskaĵoj estas kulturataj en apartaj vitrodomoj, varmigataj per akvo el naturaj varmaj fontoj.


La lasta parto de la libro prezentas plurajn urbojn kaj urbetojn de Islando, vidindajn konstruaĵojn, el kiuj la plej imponaj estas la nova universitato de Reykjavík, la navigacia lernejo en la sama urbo kaj la tre moderna elektra centralo, konstruita sur la rivero Sog.

El teknika vidpunkto la libro estas prezentita bele. La fotoj kaj preso estas tre klaraj: la lingvo ĝenerale kontentiga.

Ĉiu, kiu iam vizitis Islandon kaj ĝuis la gastamon de tiu nobla kaj klera popolo, sendube kun plezuro foliumos la libron, kiu memorigos lin

pri multaj detaloj, viditaj kaj travivitaj en Reykjavík, Thingvellir, Vestmannaeyjar, Akranes, Akureyri kaj en aliaj lokoj kaj partoj de la insulo. Kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne havis la okazon viziti ĝin, tute certe profitos el la libro novan scion en formo tre agrabla kaj alloga.

I. Lapenna.



*Tipa malnova farmbieno Islanda.
(multe pli malgranda ol en la libro mem)*

***Antaŭ Dumil Jaroj**, de Emmanuel, per Fr. Cândido Xavier ; trad. L. C. Porto Carreiro Neto. Eld. Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio. 18×12cm., 400 p., prezo broŝ. 15 ŝil., afranko 9p.

Laŭ la tradicio de *Quo Vadis* kaj *Fabiola* (por mencii nur la du verkojn konigitajn al la Esperantistaro per Esperanta traduko) kaj multaj aliaj, kiuj traktas la epokon de la frua Kristanismo, venis al ni nova romano tuŝanta la vivon, morton kaj signifon de Jesuo el Nazareto. Tio efektive fonas la rakontadon pri la vivo de Publio Lentulus Cornelius, romana patricio, kaj pri liaj familio, publika vivo, problemoj kaj animaj konfliktoj. La priskriboj elstare reliefigas la intrigojn kaj fluojn en la Romana alta

socio de la jaroj 31 ĝis 79 de nia erao kaj montras la signojn de la dekadenco, kiu antaŭiris la forpereon de tiu civilizo.

En ĉi tiu intense emocia dramo—kaj dramo estas ĝusta esprimo—pri la elvolviĝo de homaj karakteroj, Publio rolas kiel la materialisma personigo de la ideoj kaj tendencoj de sia epoko ; dum lia edzino Livia simboligas la inklinon al la malmateriala, spirita pensmaniero.

Irinte en Palestinon pro la malsano de sia filino, la fiera patricio renkontas la Majstron en Kapernaum kaj momente falas sub la sorĉon de tiu fortega personeco. Li ricevas konsilon kaj avizon pri lia elektopovo en la formado de sia destino kaj . . . kiam li revenas en sian hejmon li trovas sian filinon saniĝanta. Tamen la medio, la edukado kaj la intelekto venkas en la interna lukto, kaj la romano sekvas la vojon de teraj prestiĝo, gloro kaj renomo. Tiujn premiojn atingante li vidas la ruiniĝon de siaj esperoj kaj planoj kaj perdas feliĉon, internan pacon kaj animan ekvilibron. Li forfremdigas sian edzinon pro miskonprenoj pri ŝiaj sindono kaj servo, kaj ŝi, sekvanta la vojon de humilo, sufero, rezigno kaj abnegacio en la servo de la Kristo, fine trafas malhonoran morton en la cirko antaŭ la okuloj mem de sia edzo en la momento kiam li ĝuas la plej altajn momentojn en sia tera gloro.

Tio kernece estas la fluo de okazoj ; sed priskribi la komplikajn, genie teksitan intrigon estas neeble en nura komentario. Multon en la romano, precipe en la dua parto, iuj legantoj nomos simple propagando, kaj laŭ kriterio de pura literaturo tio estas vera, ĉar la romano estas kvazaŭ lernolibro pri la moralo laŭ la doktrino

spiritisma. Des pli granda estas la merito de la verko, ke spite de la propagando ĝi sukcesas prezenti intrigon, scenojn kaj personojn tiel, ke oni sentas malinklinon formeti la libron ĝis la lasta paĝo estas atingita.

Miaopinie la eldonistoj faris psikologian eraron donante antaŭ la romano klarigon pri la verkmaniero. Laŭ la antaŭinformo la tuto estas transdonita pere de mediumo, Fr. Cândido Xavier, kiu mem—laŭ la informo—estas el neklera familio kaj nekapabla verki romanon. Tiu teksto estas tre interesa kaj scivoliga, kaj ni volus havi pli da informo pri tiu ĉi rimarkinda personeco. Tio tamen devus veni post la romano. La efiko estus multe pli granda kaj frapanta. Laŭ la nuna aranĝo oni riskas, ke la eventuala leganto ne legos ĝin pro antaŭjuĝo.

La sciigo, ke ĉi tiu romano venis el la spirita mondo kaj estas laŭ pretendo aŭtobiografio de Emmanuel (iama Publio Lentulus Cornelius mem) certe stimulos diskutadon. Estu kiel ajn sur kiu flanko de la polemiko oni staros, neniu povos nei, ke la verko, precipe en la unua parto kie la moralaj instruoj ne tiom trudiĝas kaj kie la intrigo estas lertege kondukita, estas unuaranga peco de literaturo. La konstruo portas la stampon de majstra mano, la priskriboj havas aspekton de aŭtentiko, la personoj vivas. Iujn tekstojn oni legos kun profunda emocio.

Pri la lingvo de la traduko mi povas ripeti nur, kion mi jam diris pri libroj el la sama fonto: ke ĉiuj niaj verkoj ricevu la saman dorlotan zorgon kaj flegon antaŭ ol transdono al la presisto.

Interesa, pensiga kaj ĝuebla verko, nepre leginda.

Mason Stuttard.

INFANOJ KAJ PATRINOJ

de

Dorothy Canfield Fisher

(trad. T. J. Gueritte)

Racia, nescienca, rigardo al patrineco, interesa al patr(in)oj de infanoj ĉiuagaj.

175 pagoj - tole bindita
5ŝil. - aŭfranko 6p.

Eldonita de

The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Mendu ĉe

**U.E.A., Heronsgate,
Rickmansworth (Herts.)**

Valora kaj utila libro por ĉiu estas la nova tute reviziita eldono de

NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO

de

LOUIS BASTIEN, Akademiano

317 paĝa, bele presita kaj bindita
Prezo 12ŝ. 6p. aŭfranko 6p.

Eldonita de

**The Esperanto Publishing Co. Ltd.,
Anglujo**

*Mendu ĉe vialanda librovendejo
aŭ ĉe*

**Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo**

Mason Stuttard :

Reĝaj Komisionoj

Karakterize brita institucio

DE tempo al tempo la mondo ekscias, ke en Britujo oni elektis *Reĝan Komisionon* por la esploro de difinita afero. Povas esti, ke post intervalo oni legas pri *Raporto de Reĝa Komisiono* kaj eble scivolas pri kio fakte temas. Kio estas Reĝa Komisiono, kian rolon ĝi ludas en la vivo brita, kian valoron ĝi havas? Jen trafaj demandoj ofte farataj de nebritoj.

Kiam problemo nacigrava leviĝas, estas la kutimo jam dum kelkaj jarcentoj krei komisionon, kiu esploru la aferon. La reĝo subskribas la instrukcion pri kreo de tia komisiono, sekve la nomo *Reĝa*, sed la iniciato venas de la ministroj. La dekreto ordonas la starigon de speciala komitato, kies tasko estas aranĝi oficialan enketon tute senpartie kaj fari raporton kun rekomendoj. La anoj de la komisiono povas esti kiuj ajn civitanoj, kaj laŭ ĝenerala principo oni nomas personojn, kiuj havas nenian aktivan privatan intereson (laŭ vidpunkto de persona profito, ĉu mona, ĉu prestiĝa) en la eventualaj rezultoj de la enketo.

Unu tia Komisiono — pri popol-nombrado (vidu *Esperanto* N-ro 540 1950)—stimulis multe da intereso kaj gazeta komentario pro ĝiaj rekomendoj pri aktiva propagando por pliintensigo de naskado, kaj rekompencoj al gepatroj. Alia komisiono, kies tasko estis enketi pri la gazetaro brita, konstatis ĝin “sen korupto, tute libera je ia diktatoreco kaj nemonopolema.”

Interesa fakto estas, ke la membroj de Reĝa Komisiono ricevas nenian

salajron aŭ honorarion, sed nur rekompencon pro perdo de tempo/salajro rezultanta el la laboroj por la komisiono. Necesas emfazi, ke la komisionoj estas tute ne leĝdonaj, kaj iliaj rekomendoj estas nur konsiloj. La komisionoj ne povas devigi iun ajn personon veni antaŭ ĝin por doni ateston aŭ informon; sed jam ekzistas tradicio, ke donado de informoj estas laŭdinda civitana devo, kaj en la historio oni registris tre malmultajn rifuzojn. Reĝa Komisiono ne estas jura enketo, proceso, sed libervola preskaŭ neformala esploro. Eĉ ne estas necese, ke inter la membroj regu unuanima opinio pri la konkludoj.


La valoro de tiaj komisionoj estas pruvebla per tio, ke gravaj sociaj reformoj multfoje sekvis la rekomendojn. Eble surprizos multajn—eĉ Britojn—ke la starigo de la Unio Kanada estis rekta sekvo de rekomendoj de Reĝa Komisiono. Multaj aktoj de la brita parlamento estas konsekvencaj rezultoj de tiaj enketoj, ekz. leĝoj rilate al problemoj ligitaj kun edzeco kaj eksedziĝo, pri universitatoj, eklezia disciplino, domkonstruado en Skotlando, ŝtata asekuro k.s.

Reĝina Komisiono de 1851 starigita kun la tasko raportii pri Granda Ekspozicio ankoraŭ ekzistas! La kaŭzo estas, ke la ekspozicio, kiam ĝi fakte okazis, estis tiel granda sukceso kaj la monprofitoj tiom ampleksaj, ke la Komisiono (kompreneble kun novaj personoj) daŭrigis kaj daŭrigas la administradon de la kapitalo tiel kreita. Oni devis aĉeti vastajn

terenojn kaj konstrui domojn divers-specajn, kiuj kun la paso de la tempo fariĝis treege valoraj investaĵoj. La rentojn kaj lupagojn de tio la komisiono direktas por scienca kaj arta edukado kaj klerigado en Britujo.

Tre povas esti, ke la iniciaton pri Reĝaj Komisionoj oni ŝuldas al Vilhelmo I, kiu post la sukcesa invado en 1066 starigis komisionon, kiu enketu kaj raportu pri bienposedo en Britujo. La preskaŭ 900-jaraĝa raporto de tiu komisiono estas inter la plej gravaj kaj plej ĵaluze gardataj historiaj dokumentoj de la brita popolo—la unika *Domesday Book* (registro pri bienposedo, kiun oni eĉ nun ofte konsultas en procesoj pri bienlimoj).

Por multaj homoj la ekzisto de institucio konsistanta el ordinaraj privataj individuoj, kun la eblo enketi objekte kaj senpartie, kun la libero



La Kesto "Domesday" kun la malpli granda libro malfermita kaj la pli granda fermita.

sentime kaj senkatene esprimi sian opinion, ĉu favoran, ĉu mallaŭdan, estas unika demokrata procedo, kiu povas havi nur bonajn konstruajn sekvojn por la konservo de popola volo.

El la maksimumoj de La Rochefoucauld

Nia plej granda inerto estas en la spirito, ne en la korpo.

Ĉiu plendas pri manko de memorpovo, neniuj pri manko de saĝo.

La vera rimedo esti trompata estas, kredi sin pli saĝa ol aliaj.

Memamo estas la plej granda inter ĉiuj flataĵoj.

Por elporti la feliĉon necesas pli grandaj virtoj, ol por elporti la malfeliĉon.

Pli facilas esti saĝa por aliuloj, ol por si.

Oni havas malpli da plezuro, se oni neniam sin flatas.

Ni volonte pardonas al tiuj, kiuj nin tedas ; neniam al tiuj, kiujn ni tedas.

MAKSIMOJ

La Rochefoucauld

(1613–1680)

Esperantigis G. Waringhien

(enhavas paralele la francan originalon).

110 paĝoj

broŝ. 4 ŝil., aŭfranko 3p.

Mendu ĉe U.E.A.

**Heronsgate, Rickmansworth,
Anglujo**

Jovo :

La vitroarto en Ĉeĥoslovakujo

EN Ĉeĥoslovakujo la lulilo de la vitro-industrio estas Bohemujo. Jam de la 14a jarcento kaj precipe de la tempo de Karlo IV-a la vitrofarado estis entreprenita en privataj laborejoj. En la 16a jarcento granda ŝanĝo okazis pro la enkonduko de potaso kaj diversaj metodoj per kiuj purigi la krudajn materialojn kaj tiel produkti absolute senkoloran vitron. Per tio nova materialo kun grandaj ekspluatebloj kreiĝis, kaj metiistoj en la kortumo de Rudolfo II-a malkovris en la ĉeĥa vitro kvalitojn similajn al tiuj en kristalo, kaj de tiam ĝi ĝuas altan reputacion.


Ĉi tiu fako de ĉeĥa krea arto estis precipe tipa de la ĉeĥa Baroko kaj Rokoko de la 17-a kaj 18-a jarcentoj. Ĝia ĉefa karakterizo estis vitrogravuro kaj vitrofacetado. Ĉeĥa vitro konservis sian pozicion en la mondmarkato ĝis la Napoleona militoj, kiam ĝi ŝanĝis la direkton de sia

eksporto de la okcidento al la orientaj merkatoj kaj dediĉis sian arton al pli popularaj bezonoj.

Grava okazo en la historio de la vitro-industrio estis la fondado en 1920 de la unua ĉeĥa Lernejo Metia por Vitro en Zelezný Brod, kie ĉiuj tradiciaj metodoj venis sub rigoran esploron kaj kie oni enkondukis multajn plibonigojn kaj je fabrikado kaj je desegnoj. La lernejo fariĝis centro, ĉirkaŭ kiu la tuta industrio evoluis al novaj grandoj. Pentrita vitro alprenis novan vivon sekve de tute originala koncepto pri la funkcio kaj rolo de koloro en la fabrikado de vitro.

Elstara en tiu fako estas Prof. J. Brychta, kiu elvolvis rimarkindan teknikon. En 25 jaroj da senĉesa eksperimentado li sukcesis enspiri en siajn desegnojn kaj figurojn vivon kaj movon, ne nur per vitroblovado sed ankaŭ per vitro-fornaj metodoj.

daŭrigo sur p. 23



Aro de kristalglasoj desegnitaj de J. Tockstein. (Vidu ankaŭ la kovrilpaĝan bildon.)

Ernesto Guillem :

Notoj pri hispana ekonomio

LA hispana popolo sin okupas precipe per la terkulturado, efektive ĝis 75% de la tuto. Nur proks. 25% loĝas en la urboj kaj sin vivtenas per la industrio, komerco kaj aliaj metioj. La vivo de la kamparanoj estas ĉie malfacila, sed ekzistas gradoj en diversaj regionoj. Ekzemple dum en la nordo pluvas kaj en iuj apudmaraj terenoj troviĝas irigaciitaj grundoj, la plej vasta tereno en la meza parto, alte super la marnivelo, estas plata kaj seka kaj ricevas ventojn de Afriko kaj brulas sub forta suno dum 300 tagoj en la jaro. Tial ne estas surprize, ke niaj kamparanoj en tiuj regionoj estas nigrabrunaj kaj sulkvizaĝaj. Tio cetere havas malbonan influon sur la rikoltojn, kiuj, rilate al tritiko ekzemple, estas nur kvarono kaj kvinono de la samspecaj en Britujo, Francujo aŭ Belgujo. En la kamparo do ekzistas ĉiam malabundo, almenaŭ por la granda plimulto.

Konsekvenco de la malriĉo en la kamparo ekzistas tiu de la urboj, t.e. de la laboristoj, la “produktantoj” kiel oni nun nomas ilin en Hispanujo. Kiel ekzemplo de la nivelo, jen kelkaj ciferoj. Tramisto gajnas proks. 600 pesetojn monate ; grava oficisto 1,200 monate, kaj estro de oficejo 1,750.. Jen prezoj de iuj varoj por komparo : (por kg.) pano 8, rizo 10, terpomoj 3.35, sukero (porciumita) 10, olivoleo (porc.) 12, sapo (porc.) 6.50, kafo (porc.) 53, paro de ŝuoj 150, viando 40, fromaĝo 40, fazeoloj 12, ŝtrumpoj el silko 85 por paro, ŝtrumpetoj 25, naztuko 10, pomoj 8, piroj 12, bananoj 7.

Mi ne volas diri ion pri vestoj, ĉar la prezoj varias de tempo al tempo, nek pri bagateloj kaj luksaĵoj. Pri tabako estas preferinde silenti, precipe tial ke antaŭ kelkaj monatoj oni anoncis ke estas oficiale permesita la aldono de sekaj terpomfolioj !

daŭrigo (de p. 22)

En Ĉeĥoslovakujo nun ne ekzistas privataj vitroentreprenoj kaj la tuta industrio estas organizita en naciaj (ŝtatposedataj) entreprenoj kie la produktado okazas laŭ severe reguligitaj planoj. Antaŭ kaj dum la milito la vitro-industrio estis grandaparte en la manoj de Germanoj sed tio ne plu estas. Precipe post la milito oni devis strebi por kapti eksterlandajn merkatojn. La ĉefa konkurenco venis de Svedlando, kie multaj specialistoj kaj fakanoj en la enlanda vitroindustrio lernis sian arton en la vitrofarejoj de Ĉeĥoslovakujo.

Por la eksportmerkato ĉefas diversspecaj pokaloj, karafoj, teleroj, korbetoj k.s. belarte facetitaj. Por tia facetita vitro oni devas uzi specialan vitron—plumbovitron, tiel nomitan pro la enhavo de plumbo, kiu rezultigas la puran kristalbrilon de la ĉeĥa vitro, redonantan ĉiujn kolorojn de la ĉielarko.

Kun sia 600-jara tradicio la Ĉeĥoj kaj Slovakoj estas jam dotitaj je granda kvazaŭ intuicio por la arto metii je vitro kaj tio estas garantio, ke la ĉeĥa vitro konservos sian pozicion antaŭ eĉ la plej severa konkurenco.

Enigma Konkurso N-ro 64

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenbergh 28, Brussel II, Belgujo.


Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 62.

N-ro 136. Horizontale : 1. parko, antaŭ, kirŝo + akno, krom, tria. 3. rizo, lolo, eble. 4. pisti, reala, mueli. 5. aromi, friso, trafe. 6. aorto, tosto, ronki. 7. izoli, tablo, ĉiama. 8. kia(e)l, nizo, pego. 10. areo, oleo, ideo + kargo, korko, garni.

Vertikale : 1. poro, aglo, krei + milda, ftizo, aĉeti. 3. ofte, brue, alie.

4. krono, aboli, ŝtela. 5. maizo, stolo, frajo. 6. sepio, heroo, kameo. 7. rekta, sango, nepra. 8. kies, ruĝa, ruze. 10. orgio, manao, akcio + aldo, boao, boji. (Sinsekvo nun bona).

N-ro 137. Koniĝas majstro laŭ sia verko. Duaj vortoj : venki, opinio, eterna, sitelo, manĝo, liano, pesto, armeo, satano, majstro, astako, patro, korto, boato, kalva, koakso, kaŭzo, struto, galerio, kokao, kvarto, poento, terni, marko, peono.



Enigmo N-ro 141. Krucnombra enigmo, por kontentigi la multajn demandintojn. *Horizontale* : A21. dividebla per 7 ; A33. oblo de 19D ; A36. oblo de A21 kaj de A24 ; B3. 3 sinsekvaj ciferoj ; B7. oblo de C4 ; B11. kvadrato ; B15. kvadrato de C16 ; B29. oblo de C16 ; C29. oblo de 23D ; C32. oblo de A21 ; D3. kvara potenco de primo ; D11. tria potenco ; D15. tria potenco de 23B ; D29. duoblo de B23 ; E11. dekunuoblo ; E29. oblo de B32 ; E32. tria potenco ; E36. kiel 19D.

Vertikale : 1A. oblo de 17A ; 5A. kvadrato de B3 ; 9A. kvadrato de 35B ; 13A. oblo de 29A ; 17A. kvadrato de E32 ; 21A. 5 sinsekvaj ciferoj ; 25A. produto de A33 kaj 35B ; 29A. kvadrato ; 33A. kvadrato ; 37A. 5 sinsekvaj ciferoj ; 4B. tria potenco ; 16B. tria potenco ; 19B. la radiko el B11 ; 27B. kvadrato de 23D ; 30B. kvadrato de C4 ; 32B. duoblo de

27B ; 35B. kiel B15 ; 11D. la duono de A33 ; 19D. kvadrato de B11 ; 23D. kvadrato.

Ensendis S-ro A. H. v. d. Broek (Ned.)

Enigmo N-ro 142. dek, el, si, li, dek, inter, sin, peli, sin, vane, mal, pano, mi, al, ok, aŭ, sen, pro, da, per, laŭ, mil, kolo, trans, el, pra, meblo, mal, po, mem.

La ĉi-supraj vortoj estas donitaj en la ĝusta sinsekvo, la ĉi-subaj en la alfabeto sinsekvo. Intermetante kunligan literon inter ĉiun vorton el la ĉi-supra serio kaj unu vorton el la ĉi-suba serio, vi povas formi 30 novajn vortojn. La kunligaj literoj en la sinsekvo de la vortoj el la ĉi-supra serio formas esprimon en la Proverbaro. alo, amo, ano, ano, aristo, do, fero, galo, gramo, haroj, ido, io, lasta, leganta, mento, nesto, neto, oni, optika, oro, peri, racio, rando, stilo, tenta, tero, tero, tro, trulo, vino.

Ferenc Szilágyi :

Novelo

La perdita velo

KA R L O
estis iom
pli aĝa ol

Ester, sed ankoraŭ ne tute 18-jara. Blankvizaĝa junulo, momente kun papavoj de la pasio sur la vangoj. Hieraŭ ili gustumis la

unuan kison. Sed nun estis brila sunlumo kaj la knabino forigis lin :

—Ne-e, ne stultu, Karlo; sed kiel vi povas nun esti ĉi tie ?

Karlo perdis sian certecon. Li eksidis kaj hezitante li metis sian ĉapon sub la seĝon. Per sia maniko li forviŝis la ŝviton de sia frunto. Li ŝvitis facile, eĉ pro problemoj.

—Mi nur enkuris. Mi devas enmanigi leteron al la prokuroro. La telefono malfunkcias kiel kutime. Mi mi volis vidi vin por momento.

La knabino rimarkis nubon sur lia vizaĝo.

—Ka-arlo ! Kiam vi finos ĉi-vespere ?

—Pli frue ol kutime. Jam je la sesa. Kial ?

Liaj bluaj okuloj reekbrilis. La bruna katidino ekludis :

—Mi demandas nur. Eble, mi povus eliri ien . . . ĉe la kverkoj ?

—Jes, tuj post la sepa. Ĉu nun mi rajtas vin . . . ?

—Ĉe la kverkoj, diris kun promesa koketeco la knabino.

Karlo jam devis kuri, rapide, feliĉe. Ester kantetis bonhumore. De malproksime murmuris fora tondro—la postsonoj de la ĵusa milito, kies

maltrankvilo ankoraŭ reekflamadis ĉe la limoj.

* * *

Karlo kalkulis la minutojn. La ĉefkelnero estis kelkfoje malmolmana. Karlo preterkuris la preĝejon, la etan boskon ĉe la rokfunda, rapida rivereto. El la proksimaj montdeklivoj duflanke la vento, kiel vualrubando de melankoliaj tonoj ŝvebigis la blekadon de sin paŝtantaj bovoj. Li preterkuris dometojn. La urbo estis premata en mallarĝan valon. La strataj domoj en la longa strato plilongiĝis internen al la korto, meze de la korto loĝis malpli bonhavaj homoj ol ĉe la strato kaj fine de la mallarĝaj kortoj en kadukaj domaĉoj la mizeruloj, periferianoj de la urbeto socio, vidvinoj de ministoj kaj similaj. La viroj ne vivis longe en la minurbeto.

Karlo hezitis momenton. Kvin disponeblajn minutojn li ankoraŭ havas. Li enkuros al panjo. Nur por kvin minutoj.

La patrino de Karlo estis vidvino. Ili loĝas en kortfina domaĉo. La ekonomiaj zorgoj forigas Karlon el la tondonanta junularo; la urbeto estas trilingva kaj la ŝovinisma propagando floras. Sed Karlo estas ekster la rondo. Li ŝvebas en la maltrankvila mondo, en la kabanaĉo, kvazaŭ en la aero. Jam ĉio estos bona. Panjo resaniĝos kaj Frateto plenkreskos. Frateto estas lia nevo. Lia fratino malaperis eksterlande, la knabeto restis ĉe ili. Karlo iĝas babilema nur kiam li estas kun la knabo. La kromnomo de Karlo estas “Sanktulo”, kun moka akcento. Hieraŭ li kisis

knabinon la unuan fojon. Karlo estas nura floro kreskanta ĉe la domofino.

* * *

—Ne timu, Panjo. Mi nur enkuris survoje. Ĉu nenio mankas?

—Ne. Kiel vi ŝvitas, Karlo! Gardu vin bone. Vi kreskas subite.

Ŝi tusetis. Karlo rapide helpis ŝin fari fajron, kaj li jam kuris.

—Vi eĉ ne adiaŭas min, plendis la patrino.

—Mi devas kuri, kaj mi ŝvitegas, rekriis Karlo. Vi ricevos duoblan porcion vespere.

Je la 11-a li jam estis transdoninta la leteron al la prokuroro. Tiu tralegis ĝin kun marmora mieno kaj rigardante super la knabo li proklamis en la spacon:

—Diru al sinjoro Majoro, ke mi venos baldaŭ.

Survoje al la hotelo, ĉe la parko, li vidis Frateton. Karlo devis halti:

—Kio estas al vi, Frateto? Kial vi ploras?

—La masto de la velboato, kiun Karlo faris al Frateto, rompiĝis.

—Donu la boaton rapide al mi. Mi riparos ĝin poste.

—Nu-un! ploretis la knabo. Larmoj faris purvojojn sur la malpura vizaĝeto.

—Nun mi devas kuri al la hotelo, diris Karlo senpacience.

* * *

La ĉefkelnero jam atendis lin kun plenblovitaj vangoj:

—Sentaŭgulo, kie vi vagadis? Tuj al la majoro, li jam demandis.

Dum la raporto de Karlo venis tute nova gasto al la tablo de la majoro—fremda pastro kun milita rangdistingo sur la kolumo. Karlo fervoris ĉirkaŭ li kun profesia komplezemo. Li servis al li glason da biero. La pastro dankis lin, ne rigardante al li.

Nun proksimiĝis la manĝtempo kaj en la vasta, drinkodora manĝejo la gastoj jam kolektiĝis. Karlo ne plu havis tempon pensi pri la dolĉaj sensacioj de la vivo. Por momento li vidis la alvenantan prokuroron, kiu tuj malaperis kun la majoro kaj la pastro. En la manĝejo vaporis la forte spicitaj supoj, tintis la glasoj kaj parolŝiraĵoj miksiĝis kun laodoro de alkoholaĵoj.

* * *

La majoro raportis pri gravaj okazaĵoj. La partizanoj nun verŝajne kaŭzis gravan malfacilaĵon. Ili transpaŝis la limon—estis nove deciditaj limoj, kaj konstanta maltrankvilo. La majoro atingis la plej gravan frazon de sia raporto kaj lia akra voĉo nun altiĝis je falseto: la partizanoj atingis la najbaran urbon. La distanco estis ne pli ol 30 kilometroj. Estis grave, ke la publiko ne sciigu pri la okazintaĵoj. La difekto de la telefono estis bonvena. Oni devas agi rapide.

* * *

Kaj nun, ĉirkaŭ la 1-a horo la tempo subite ekkuregis.

Antaŭ la unua horo la konspirantoj de la urbo aŭskultis tro optimistan raporton de sia heroldo. La kunsido okazis kiel kutime, en forlasita ŝakto, bone kaŝita inter la montoj. La najbarurbo falis, kaj la armeo de la Ŝtato estas marŝopreta malantaŭ la partizanoj. La heroldo ne estis tute sobra, li jam antaŭe trinkis je la ĝojo kaj nun ĉiuj kuntintigis siajn glasojn. La kaŝejo estis bone provizita. En la deko de ĉeestantoj estis reprezentitaj ĉiuj variantoj de junaj viroj, idealistoj, kalkulemuloj, strebuloj kaj aliĝemuloj. Ankaŭ ĉi tie oni decidis rapide: surprizatako en la urbeto, forigo de la oficantoj, gvardiŝanĝo, arestigoj kaj

liberigoj, hontprocesioj de viroj kaj virinoj, kiuj “amikiĝis”. Ĉio devas okazi tuj, ke la Armeo trovu la novan situacion, kiam ĝi triumfe enmarŝos. Kaj ili forlasis la groton kaj grimpis malsupren. Ili havis armilojn. Kiam ili alvenis al la kaŝloko de la bicikloj iom super la ŝoseo, vento kirliĝis kaj el la facila polvo de la altmonta aero aperis aŭto, malrapide spiralanta sur la malfacila vojo.

—Rigardu, kriis la heroldo. La majoro ! Ni venos aŭte urben !

Eĉ por momenta penso ne estis tempo. Li celis per sia pistolo al la aŭto, kiu haltis por momento, ĉar ankaŭ ili estis rimarkataj. La majoro kolapsis kun ruĝa strio sur la maldestra vango. La pastro, kiu akompanis la majoron, subite ĵetis sin sur la fundon de la veturilo. Por momento ĉio haltis, sed tuj poste kriegantaj junuloj transprenis la aŭton, ĵetis la kadavron en la pakaĵujon. Unu el ili tiris malsupren la malmolan ĉapelon de la pastro ĝis lia nazo, sidiĝis sur lian kapon kaj kriis :

—Nu, sinjoro Arkimandito, aŭ kiel oni honorigu vin, vi revenos elegante en la urbon !

La stranga procesio de aŭto kaj bicikloj laŭte ekveturis. Ĝi ankoraŭ ne atingis la loĝatajn partojn ; nur sciuroj kaj arbaraj birdoj estis iliaj atestantoj. Sed kilometrojn antaŭ la urbo la ŝoseo tribranĉiĝis kaj tie ili ekvidis grandan militistan kolonon, kaj preskaŭ samtempe ankaŭ trajnon plenŝtopitan de soldatoj. La trajno veturis al la urbo. Ili estis preskaŭ ĉe la fervoja gardodomo antaŭ ol la trajno. Ankoraŭ unu paŝo, kaj ili estus en kaptilo. La sola ebleco estis tuj eskapi kaj malaperi en la montaro.

Tio okazis je la tria horo.

* * *

Je la tria horo Karlo pensis pri la divido de la vespero inter Ĝester, Frateto kaj Panjo. En la urbo komenciĝis ia nervozeco. Sed neniu sciis ion precizan.

Duonon post la tria la regula soldataro de la lando jam repremis la ribelulojn. Samtempe la korpo de la majoro kun la tremanta, ŝvitoplena pastro realvenis al la urbo. Li estis proksima al apopleksio. La junularo eksentis danĝeron, kaj junaj viroj subite malaperis de sia hejmo. Ankoraŭ la milito estis ĉeestanta.

Je la kvara kaj duono la militkomitato finis la intertraktojn. Laŭ la pastro la atencintoj verŝajne konsistis el 30-35 personoj.

—Tiom da friponoj ne povas malaperi el la urbo, diris la komandanto.

Je la kvina revenis la elsenditaj patroloj, kiuj trude kolektis la restintan junularon al la kampo, ĉe la montdeklivo. Pli ol cent junuloj staris tie en la malfrusomera posttagmezo, rigide, time, scivole, senvorte. Inter ili estis Karlo.

* * *

Kvaronon antaŭ la sesa oni ordonis ilin en du vicojn. La oficiroj kaj la pastro alvenis. La komandanto diris :

—Bonvolu, sinjoro pastro. Se vi rekonas iun, diru afable.

Antaŭ la pastro estis amaso da rigidaj vizaĝoj. Li protestis en si mem, kiel antaŭe li jam protestis laŭte. Sed la komandanto havis fortan volon. Malrapide li preteriris la unuan linion. En la dua linio staris Karlo. Kiam li atingis lin, la bluaj okuloj de la knabo ne povis kaŝi ian profesian saluton de kelnero. La pastro senintence haltis. Li venis hodiaŭ en la urbon. Sed tiun ĉi vizaĝon li konas. La komandanto akre observis. Li ne lasis tempon por pensado.

—Vi rekonas lin, ĉu ne ?

La pastro balbutis ion protest-similan. La komandanto kriis :

—Forportu lin tuj !

La pastro havis gravajn dubojn, sed la komandanto resumis la situacion : Oni devas radikale fortranĉi la ribelemon. La knabo estas certe kulpa, eĉ se li ne mem faris la atencon. Kaj cetere kiel vi povus koni lin, sinjoro pastro ?

* * *

Post tio Karlo havis nur minutojn el sia vivo. Komence li komprenis nenion kaj dum la lastaj du minutoj li estis duonsvena. La bildoj de la vivo kunkuris, vaste ondadis antaŭ li en kapturna rapido. Lia rigardo apenaŭ perceptis la vastan kampon, la amason, la komandovortojn, lian propran pastron kun la kruco. Li provis liberigi sin de la inkubo en senartikula kriego. Poste estis nenio.

La tempo haltis.

* * *

La pastro fartis malbone. Tuj post la sceno ĉe la kampo li veturis al la hotelo, mendis glason da biero por forigi la sekecon de la gorgo. La ĉefkelnero servis lin. La restoracio estis silenta, kiel kriptio.

—Mi petas pardonon, pastra moŝto. Mi estas sola. Nia trinkservanto estas arestita.

—Ĉu . . . ? La pastro demandis sen speciala intereso.

—Laŭdire li konspiris. Sed mi kredas, ke li estas senkulpa.

La pastro subite eksaltis. Nun, nun li komprenis, kie li estis vidinta la knabon. Sed oni ne kutimas atenti la vizaĝon de kelnero. La ĉefkelnero ŝtoniĝis. Mekanike li kriis post la kureganta pastro :

—Bonvenon denove, pastra moŝto !

* * *

Tuj post la morto de Karlo okazis io surpriza. Lia korpo ankoraŭ estis varma, la pafinta trupo ankoraŭ ne formarŝis. Tiam tute subite kaj mistere aperis eta figuro ĉe la mortinta korpo ; iom pli ol trijara knabeto, kiu ŝovis sin antaŭen inter la hompiedoj kaj antaŭ ol oni povis rimarki lin, li jam estis ĉe la kadavro. El la poŝo de Karlo pendis la pinto de la velo. Frateto kaj la boato ricevis sangmakulojn.

La komandanto plengorge kriegis :
—Forigu de tie la bubaĉon ! Kia ordo estas ĉi tie ?

Oni forpugnis Frateton kaj ŝiris la sangan velon el liaj manetoj. Kiam oni estis survoje kun li al la barilpordo de la kampo, alvenis la aŭto de la pastro.

* * *

La tempo haltis kaj staris silenta. Ĝi rigardis la etan rigidan urbon. Morgaŭ ĉio reelastiĝos.

* * *

La pastro baraktis dum tuta nokto. Matene li konsoliĝis : ni estas rimedoj en la mano de ne-elkalkulebla, granda Volo. Li forlasis la urbeton kaj retrovis siajn labortagojn.

* * *

Sur la lipoj de Ester dum longa tempo brulis la rifuzita kiso. La tempo haltis por ŝi. Sed ĝi ekmarŝis denove. Post semajnoj la “hazardo” aperigis al ŝi junan viron, amindan. La memoro de Karlo restis por la festotagoj.

* * *

Por la patrino la tempo haltis. Sed ŝia doloro transiris en transteran plezuron. Ŝi estis malsana, pia kaj mem mortonta. Ŝi atendis renkonton kun sia filo.

* * *

Frateto estis tro malgranda por senti la halton de la tempo. La tempo reekfluis kiel rapida rivereto. Li tute orfiĝis kaj la jardekoj, kiuj preterpasis, estis sovaĝaj. Li iĝis stranga sin-izola, tro silenta junulo. Li iĝis lernanto en frizejo, poste barbiro, dungito en la urba frizejo. Li estis modesta kaj obeema.

Sed dum varmega somera tago, tuj antaŭ la sesa posttagmeze, kiam li estis sola kun nekonata oficiro, li ekscitiĝis. Io stranga osciladis al lia cerbo. Li foriris por momento por

akrigi la razilon. Kiam li revenis li diris, nerigardante al la oficiro :

—Kie estas mia velboato ? kaj li ekdirektis la razilon al la gorgo de la oficiro.

Li vundis nur iomete la oficiron. Ne estis tre penige bridi lin. Li sekvis trankvile la flegistojn al la frenezulejo, sed kun difuza rigardo li serĉis sian velboaton, kiun la subite vekitaj internaj ondoj komencis senĉese ĵeti tien-reen, kiel nuksoŝelon sur la surfaco de la malsana animo.

ĈU VI PAGIS VIAN KOTIZON POR 1952 ?

Esperantista Vivo

Naskiĝo

Iserentant. Al Ges. R. Iserentant (Blankenbergse steenweg 72, Brugge, Belgujo) filo Dirk, je 18 novembro 1951.

Geedziĝo

Lindaas-Torgnes. F-ino Annalise Lindaas, el Oslo, kaj S-ro Sigurd Torgnes, Stortorgnes, Norvegujo, je 9 junio 1951.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Barešová, F-ino Adela, en Praha, Ĉeĥoslovakujo, je 23 Oktobro 1951, 66-jara.

Fagelund, S-ino Asta, en Oslo, Norvegujo, je 15 Novembro 1951.

Hell, Karl, en Munkeno, en Novembro 1951, 83-jara. Unu el niaj pioniroj, kiu multe laboris inter la fervojistoj.

Kalugin, S-ino Trude, en Linz, Aŭstrujo, je 16 Aŭgusto 1951.

Internacia Konkurso 1951

Stato je la 30-a de Novembro 1951

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Brazilo ..	2500	4666	186.6
2. Maroko ..	400	655	163.7
3. Portugalujo ..	600	935	155.8
4. Svislando ..	1400	2055	146.8
5. Sud-Afriko ..	250	340	136.0
6. Germanujo ..	2400	3260	135.8
7. Finnlando ..	2000	2690	134.5
8. Italujo ..	1700	2225	130.9
9. Hispanujo ..	1100	1365	124.1
10. Izraelo ..	300	360	120.0
11. Japanujo ..	800	935	116.9
12. Belgujo ..	2100	2415	115.0
13. Norvegujo ..	1400	1569	112.1
14. Urugvajo ..	250	265	106.0
15. Britujo ..	12000	12710	105.9
16. Islando ..	500	510	102.0
17. Svedlando ..	5300	5316	100.3
18. Nederlando ..	5000	4893	97.8
19. Francujo ..	5700	5538	97.1
20. Danlando ..	2800	2680	95.7
21. Aŭstrujo ..	1000	942	94.2
22. Aŭstralio ..	900	830	92.2
23. Kanado ..	250	230	92.0
24. Nov-Zelando ..	800	730	91.2
25. Usono ..	3000	2544	84.8
26. Argentino ..	800	640	80.0
27. Irlando ..	250	195	78.0
28. Kubo ..	250	145	58.0



ESPERANTO KAJ RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
	Lundo 07.15–07.30	Stockholm. 27.83m., 49.46m. P.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	18.00–18.30	Rabat. 482m. K (franclingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko.
Mardo	22.15–22.40	Hilversum, 402m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon): V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	01.15–01.30	Stockholm. 49.46m., 27.83m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94, rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern.
Merkredo	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala Cd., C. Ameriko.
	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	17.30–17.50	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	Ĵaŭdo 08.30–08.45	Paris. 445m. K.
Vendredo	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel lunde. P. D-ro Privat.
	17.30–17.50	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (nur la unuan vendredon de ĉiu monato). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde. M.
	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Noto : Oni rimarkigas pri la nova kurso el Maroko (lunde) ke dankleteroj el eksterlando estus helpaj.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Officejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 244

1-an Decembro 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 30a de Novembro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	8595	8363
Individuaj membroj :		
MJ	877	897
MA	4256	4558
MS	288	285
Patronoj ..	15	16
DM	209	253
HM	59	59
	5704	6068
	14299	14431

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Cavalcanti, F-ino M. de Lourdes V., Rio de Janeiro, Brazilo
 Graf, S-ro B., Biel, Svislando
 Jost, S-ro K., Zürich, Svislando
 Hiltpold, S-ro K., Corseaux, Svislando
 Voirol, S-ro W., Biel, Svislando
 Sonderegger, S-ro W., Zürich, Svislando
 Fotherby, F-ino A., Surbiton, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

283. Santos Aguiar, S-ro D., Rio de Janeiro
 284. Cavalcanti, D-ro B., Rio de Janeiro
 285. Batista de Faria, S-ro J., Campos
 286. Macedo, S-ro M. de, Rio de Janeiro
 287. dos Reis, S-ro A. J., Rio de Janeiro
 288. Medeiros Silva, S-ro B., Rio de Janeiro
 289. Timponi, D-ro C., Rio de Janeiro
 290. Bueno Vilela, S-ro P. G., Rio de Janeiro
(ĉiuj en Brazilo)

PATRONOJ 1952

4. Gueritte, S-ro T. J., Surbiton, Anglujo
 5. Ravestein, S-ino J. M., Den Haag, Nederlando
 6. Jervis, S-ro R. F., Slough, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

22. Gigandet, S-ino R., Solothurn, Svislando
 23. Serra, D-ro P., Aveiro, Portugalujo
 24. Ahlgren, S-ro A., Göteborg, Svedujo

25. Holmström, S-ro A., Silverhöjden, Svedujo
 26. Larsson, S-ro C., Sala, Svedujo
 27. Lind, S-ro E., Trollhättan, Svedujo
 28. Nilsson, S-ro N. G., Göteborg, Svedujo
 29. Söderberg, S-ro K., Upsala, Svedujo
 30. Marchand, F-ino M., Paris, Francujo
 31. Baatan, S-ro W., Utrecht, Nederlando
 32. van Delden, S-ro P., Deventer, Nederlando
 33. van Dijk, S-ro J. P., Oosterland, Nederlando
 34. Noordhoff, F-ino D., Blaricum, Nederlando
 35. Postma, F-ino T., Rotterdam, Nederlando
 36. Wijnbergh-Pool, S-ino A., Amsterdam, Nederlando
 37. Zorgdrager, F-ino C., Amerongen, Nederlando
 38. Fuller, S-ino G. E., Sutton, Anglujo
 39. Murray, S-ro R., Thorpe Bay, Anglujo
 40. McDonald, S-ro R. J., Kenley, Anglujo
 41. Phelan, S-ro H. K., London, Anglujo
 42. Ryan, S-ino J. S., Manchester, Anglujo
 43. Boscarino, S-ro G. S., Ragusa, Italujo
 44. Asp, S-ro B., Johanneshov, Svedujo
 45. Olsson, F-ino G., Strömsnäsbruk, Svedujo
 46. Pehrsson, S-ro R., Stockholm, Svedujo
 47. Persson, S-ro G. L., Hälsingborg, Svedujo
 48. Persson, S-ro L., Häradsbygden, Svedujo
 49. Rosengård Hansen, S-ro A. E., Middlefart, Danujo
 50. Baur, D-ro A., Bern, Svislando
 51. Jayet, F-ino E., Morges, Svislando
 52. Geers, F-ino B., Heide-Kalmthout, Belgujo
 53. Impanis, F-ino M. R., Brussel, Belgujo
 54. Mooij, S-ro P. H., Brussel, Belgujo
 55. Lamberts, S-ro V., Bruxelles, Belgujo
 56. Soyeur, S-ro J., Liège, Belgujo
 57. Baas, S-ro P. W., Amsterdam, Nederlando
 58. Ouwehand, S-ro D., Den Haag, Nederlando
 59. Roelofs, S-ro J. J., Soest, Nederlando
 60. Roelofs, D-ro W. P., Soest, Nederlando
 61. Slot, S-ro R., Zeist, Nederlando
 62. Fejde, S-ro M., Nässjö, Svedujo
 63. Fingalsson, S-ro H., Gisebo, Svedujo

64. Frode, S-ro O., Göteborg, Svedujo
65. Johansson, S-ro V. A., Göteborg, Svedujo
66. Engler, F-ino M., Mainz, Germanujo
67. Flick, S-ro W., Wahn, Germanujo
68. Fritsch, D-ro E., Klenze, Germanujo
69. Gerwin, S-ro R., Lobberich, Germanujo
70. Grasmair, S-ro E., Berlin, Germanujo
71. Himmelstoss, S-ro E., Osnabrück, Germanujo
72. Köditz, S-ro F., Wipperfurth, Germanujo
73. Kreutzer, D-ro J., Frankfurt, Germanujo
74. von der Ley, S-ro W., Tailfingen, Germanujo
75. Michling, S-ro H., Hannover, Germanujo
76. Raab, S-ro H., Nürnberg, Germanujo
77. Sandrock, S-ro O., Essen, Germanujo
78. Schorcht, S-ro A., Hannover Germanujo
79. Schuster, S-ro E. L., Wiesbaden, Germanujo
80. Wilke, S-ro H., Berlin, Germanujo
81. Wittbrodt, S-ro, Berlin, Germanujo
82. Zwecker, S-ro O. E., Hamburg, Germanujo
83. Ahali, S-ro J., Haifa, Izraelo
84. Clarke, S-ro W., Dunfermline, Skotlando
85. Collinson, Prof. W. E., Liverpool, Anglujo
86. Finbow, S-ro A. L., Huddersfield, Anglujo
87. Fisher, S-ro A., Parkstone, Anglujo
88. Flugel, Prof. J. C., London, Anglujo
89. Fraser, S-ro T. C., Kirkcaldy, Skotlando
90. Girling, S-ro A. N., B.A.O.R.
91. Guise, S-ro W. C., Rugby, Anglujo
92. Houghton, S-ro C. M., Welwyn Garden City, Anglujo
93. Jayne, S-ro E. K., Croydon, Anglujo
94. Jobbins, F-ino A. F., Tunbridge Wells, Anglujo
95. Kennedy, S-ro D., Bishop Auckland, Anglujo
96. Kennedy, S-ino M., Bishop Auckland, Anglujo
97. Lewin, S-ro M., Dunstable, Anglujo
98. Macfarlane, F-ino A. G., Glasgow, Skotlando
99. Pearson, F-ino E. M., York, Anglujo
100. Perry, S-ino M. J., Herne Bay, Anglujo
101. Preedy, S-ro G. L., South Cerney, Anglujo
102. Prince, S-ro A., Letchworth, Anglujo
103. Robson, S-ro B., Cheam, Anglujo
104. Saunders, S-ino A. J., Ventnor, Anglujo

105. Shaw, S-ro E., Stafford, Anglujo
106. Tweedle, S-ino O., Bournemouth, Anglujo
107. Willan, S-ro F., Clayton-le-Dale, Anglujo
108. Williams, S-ro N., Manchester, Anglujo
109. Robb, S-ro A., Oxford, Anglujo
110. Freeman, S-ro J. R., Doncaster, Anglujo
111. Le Brun, S-ro P., Kreuzlingen, Svislando
112. Gonzalez Meana, S-ro A., Riaño Santa Ana, Hispanujo
113. French, S-ro R. J., Bexley, Anglujo
114. Laverick, S-ro A., Hetton-le-Hole, Anglujo
115. Loftus, S-ro W. J., London, Anglujo
116. Riding, F-ino E., Herne Bay, Anglujo
117. Robertson, F-ino E. M., Halifax, Anglujo
118. Blöndal, S-ro B. P., Hvammstanga, Islando
119. Renken, D-ro C., Bremen, Germanujo
120. Wehrheim, D-ro H., Hildesheim, Germanujo
121. Bonhard, S-ro L. K., Brooklyn, N.Y., Usono.

DONACOJ. F-ino G. S. Pentermann 164ŝ., F-ino C. Zorgdrager 41ŝ., J. R. G. Isbrucker 20ŝ., S-ino J. Isbrucker 20ŝ., K. Meyer 8ŝ., K. Jost 74ŝ., F-ino M. R. Impanis 2.50ŝ., D-ro H. Wehrheim 7ŝ., Postkongresa semajno Saulgrub 75ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Kio estas via V.-K.?

Respondoj (vidu p. 15)

1. (b) **Konstelacio** estas speciala grupo da steloj.
2. (a) **Kurento** estas fluo de elektro tra kondukilo.
3. (c) **Laŭreato** estas gajninto de premio.
4. (c) **Farmacio** estas scienco pri medikamentoj.
5. (b) **Mercero** estas komerco per objektoj kiel butonoj, fadenoj.
6. (c) **Oksido** estas kombinaĵo de oksigeno kun alia elemento.
7. (a) **Ofendo** estas kolerigo de iu.
8. (c) **Prioro** estas estro de monaĥejo.
9. (a) **Sarkasmo** estas akra, mordanta moko.
10. (c) **Ŝakto** estas profunda vertikala puto.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Lando pri kiu zorgas la Eternulo, via Dio ; ĉiam la okuloj de la Eternulo, via Dio, estas sur ĝi, de la komenco de la jaro ĝis la fino de la jaro. Readmono. 11. 12.

Somero 1952. Geedzoj aŭ du amikinoj kiuj deziras someran libertempon ĉe farmbieno "au pair" skribu al S-ro Hickson, Cauldron Barn Farm, Swanage, Anglujo.

Internacia Bonhumoro. Kontraŭ 1 angla ŝilingo, 2 poŝtrespondkuponoj, aŭ egalvaluto vi ricevos provnumeron de la nova, riĉe ilustrita esperantlingva revuo. I.B., Strindbergsvej 36, Kopenhavn, Danlando.

Agemaj reprezentantoj serĉataj ĉiulande de Eŭropo, por nova sprita ludo por 5 personoj. Pagokapablaj interesatoj, kiuj ricevas solan sialandan vendorajton kun bona profito, senprokraste sin turnu koncerne pluajn informojn al Hermann Rollig, Pocking-Waldstatt A12/8, (13b) Kr. Griesbach, Germanujo.

Porinfanajn bildolibrojn, ilustritajn poŝtkartojn interŝanĝos tutmonde s-ro Jiro Nimura, Hasuike-cho 57, Kokura, Hukuoka-ken, Japanujo. Ĉiam respondos.

Dezirus interŝanĝi revuojn pri motoroj kaj turbinoj ĉiuspecaj. Ĉiam respondos aerpoŝte. Korespondado certigita. A. Perez, Torremadariaga 21—I, Bilbao, Hispanujo.

PM kolektanto sendos, senpage, monatan marĉandan liston. Aprobajoj. — Jackson, 179 Leymoor, Golcar, Huddersfield, Anglujo.

Kvinoj. Interesa, amuza vortludo, angle aŭ Esperante. Kontraŭ 1ŝ. 6p. Burnham, 35 Carr Street, Marsh, Huddersfield, Anglujo, sendos plenajn detalojn.

8 gelernantoj (14 jaraj) deziras samaĝajn korespondantojn de la tuta mondo. Detaloj de S-ro J. Gowing (Instruisto), West Park School, Sunderland, Co. Durham, Anglujo.

Faldprospekto pri Waterloo, Bruĝo, Gento, Bruselo, Spa, ĉe Turista Servo : Konijnenperken, 109, Bosvoorde-Bruselo, Belgujo.

Kiajn ludojn oni ludas en kontinentaj gastejoj ? Mi bezonas informon pri tio por angla gazeto. Sendu la informon mi petas al :—S-ro Albert Laverick, 46 Station Road, Hetton-le-Hole, County Durham, Anglujo.

1–2 monatojn ni gastigos dum kaj post la Olimpiaj Ludoj, amerikajn, anglajn kaj

francajn esperantistojn, kiuj reciproke faros same. Informoj ĉe V. Eronen, Rantakylän kartano, Mikkel, Finnlando.

Bankistoj el la mondo, helpu min ! Mi partoprenas studokonkurson pri naskiĝo kaj disvastiĝo de ŝparkasoj en la mondo. Dankon. Franco Bozzano, via Cavour 33, Parma, Italujo.

La XIII-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos en Recife (Pernambuco, Brazilo) je la 9-a ĝis 16-a de Februaro 1952. Oni planas interesan programon kaj diversajn ekskursojn. Tutmondaj samideanoj estas invitataj ĉeesti la kunvenon aŭ almenaŭ sendi saluton. Adreso : Associacao Pernambucana de Esperanto, Av. Guararapes 86, sala 1110, Recife (Pernambuco), Brazilo.

Al ĉiuj, kiuj sendas bildon de floroj aŭ tramoj, mi sendos belan poŝtkarton. Nepre respondos. Dhonau, 9, Cromer Road, Sheringham, Norfolk, Anglujo.

S-ro Albert Rehill, Box 164, Nakusp, B.C., Kanado, deziras korespondi kun gesamideanoj el neangle parolantaj landoj.

Gelernantoj deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn kun la tuta mondo. Adresu al S-ro R. T. Dillarstone, 66 Henry Nelson St., South Shields, Co. Durham, Anglujo. Nepre respondos.

Helpu la Esp. movadon en Hispanujo. Por propagandekspozicio ni bezonas ĉiajn Esperantaĵojn : librojn, broŝurojn, salutkartojn (prefereble bildflanke kaj filatele afrankitajn), afiŝojn, k.t.p. Ni respondos al ĉiuj. Adreso : Esp. Propagandekspozicio, Str. Forn 19, Moy (Barcelona), Hispanujo.

Pri bredado de abeloj : A. P. Andersen (Nederlando). Prezo 5ŝ. 6p. Mendu ĉe U.E.A. aŭ ĉe vialanda libroservo.

MARISTA TERMINARO

Komandanto Peter Clissold

1ŝil. 6p. aŭ 5 respondkuponoj

Mendu ĉe U.E.A.

Atentu :

INVITO AL HUMANECA KUNLABORO

Por entrepreni internacian kunlaboron, korespondadon, interŝanĝadon kaj informadon pri socialaj aferoj kaj medicino ni deziras tutmonde kontaktojn kun

- (a) malsanuloj pro tuberkulozo (pulma-, artika- kaj alispeca), t.e. kun nuntempaj pacientoj de hospitaloj kaj sanatorioj kaj same tre volonte kun resaniĝintoj ;
- (b) kuracistoj, terapiistoj de X-radioj, ĥirurgoj, kuratoroj, flegistinoj, flegistoj, administracia laborantaro—entute kun personoj aktivaj en la agado kontraŭ tuberkulozo ĉie en la mondo.

Ni promesas senprokrastan kaj personan respondon al ĉiu. Gazetoj esperantistaj estas petataj repreŝi tiun ĉi anoncon. Estraroj de landaj asocioj kaj lokaj societoj esperantistaj bonvolu konigi la aferon al ĉi-supre menciitaj kategorioj inter siaj membroj kaj eventuale prizorgi tradukojn, instruadon k.t.p. por ebligi ankaŭ al ne-esperantistoj starigi kontakton.

Nia revuo estas oficiala organo de Sveda Federacio de Tuberkulozo-viktimoj, havante 22,000 membrojn. Ni kunlaboras intime kun medicina ekspertizo, societoj, ŝtataj organoj kaj registaraj komitatoj.

**Skribu al Redakcio de STATUS, Social-Medicina Revuo,
Kocksgatan 15, Stockholm 4, Svedlando.**

Nova ilustrita libro por gejunuloj

LA HUNDO KRUSO

R. M. Ballantyne (Tradukis J. M. Inman)

Aventuroj de junaj ĉasistoj inter
Indianoj en Ameriko antaŭ cent jaroj
150 paĝoj, 3 ŝil., aŭfranko 3p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo
aŭ enlanda libroservo**